

ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Vol. 2, N-ro 4

Aprilo 1938

Eldonanto : Internacia Esperanto-Ligo,
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Adreso de la Redakcio : Teo JUNG
Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

LA LONDONA KONGRESO ĉ. 1100 Kongresanoj en la fino de Marto

Bona Novaĵo por la Kongresanoj

En la pasinta numero, la esperantistaro povis legi pri sukceso por nia lingvo en Londono: temis pri la Cseh-metodaj kursoj kiujn aranĝis por siaj geoficistoj la grandmagazeno Selfridge, prepare al la Universala Kongreso en aŭgusto.

Nun sekvas pliaj sukcesoj, kiuj estos eĉ pli utilaj al la kongresanoj dum ilia restado en la ĉefurbo.

En Londono la plej multaj popolaj restoracioj apartenas al tri kompanioj: « Lyons », « Express », kaj « A.B.C. ». El tiuj tri organizaĵoj la firmo Lyons ĉiel estas la plej ampleksa, kaj en la tuta urbego, precipe en la centraj partoj, oni neniam trovas sin multajn metrojn for de oportuna « Lyons » (prononcu « Lajonz »). En tiaj restoracioj, kiuj ĉiuj funkcias laŭ la sama sistemo, oni sidas komforte en pura kaj hela ĉirkaŭaĵo kaj mendas ĉiajn manĝaĵojn laŭ fiksita menuo kiu klare montras la precizan koston de ĉiu ero. (Parenteze, trinkmono ne estas postulata, kvankam oni foje donas tion.)

Dum la kongres-semajno oni trovos en ĉiu « Lyons » en la centra regiono de Londono menuojn en Esperanto.

Tute ne necesas substreki, kiel utila al la alilandaj kongresanoj estos tiu aranĝo. Ĉiu scias, ke unu el la plej malfacilaj aferoj dum vizito al fremda lando, eĉ kiam oni scias iom de la lingvo, estas la mendado de manĝaĵoj en resto-

racio! En Londono, do, tiu malfacilaĵo ne ekzistas.

Sed tio ne estas ĉio. La firmo Lyons posedas ankaŭ kelkajn pli grandajn kaj grandiozajn restoraciojn, kie oni manĝas en efektiva lukso je prezoj nur iomete pli altaj, kaj kelkriate pli malaltaj, ol en la ordinaraj restoracioj.

Feliĉe unu el tiaj restoracioj troviĝas proksime de la kongresejo — kontraŭ la « Dominion Theatre », kaj tuj post la oficiala inaŭguro de la kongreso okazos tie komuna tagmanĝo por mil kongresanoj. Plue, dum la tuta semajno, la kongresanoj certe amase frekventos tiun ĉi restoracion.

Jen, do, la dua sukceso: la firmo Lyons ĵus aranĝis Cseh-metodan kurson por pluraj el la geĉelneroj en tiu ĉi restoracio. Fino Saxl gvidas la kurson, kiu okazas dum deĵoraj horoj en la restoracio mem.

Espereble la kongresanoj povos konsenti kun iu vizitanta samideanino nun en Londono, kiu diris ke ŝajne la Londona Kongreso estos la plej Esperanteca el ĉiuj el niaj universalaj kongresoj.

E. W. A.

Esperanton en la aviadon

Anglaj esperantistoj serĉas kunlaboron.

Inter la diversaj fakoj traktitaj en la Konferenco « Esperanto en la Moderna Vivo » estas aviado. Ĉi tiu grava kaj progresiva faktoro de moderna vivo devus esti bona kampo por la propagando de nia lingvo. Per flugmaŝinoj la aviada

personaro kaj vojaĝanta aerpubliko estas tre intime alproksimigita trans la materiaj obstakloj de distanco. Sed ankoraŭ regas la lingva malhelpo. Estas centoj da vojoj, en kiuj nia lingvo povus helpi al la aviadismo. Nur pensu pri la faciligo por la pilotoj, se la veteraj raportoj kaj alteriĝaj instrukcioj estus dissenditaj radie en la internacia lingvo. Krome, estas konsiderinda valoro al pilotoj, kiuj vizitas aliajn landojn kaj nuntempe estas katenataj de la lingvomalhelpoj: pere de Esperanto ili trovos amikajn kontaktojn kaj povus interŝanĝi ideojn kaj amikecojn ĉie, sendepende de kiu ajn lando, en kiu ili trovas sin.

Jam kelkaj anglaj esperantistoj profesie interesitaj en la aviadismo okupas sin pri klopodoj enpenetriĝi Esperanton en tiujn rondojn, kaj starigis utilajn kaj promesajn kontaktojn. Se estos bona subteno de intereso pri la klopodoj flanke de alilandaj samfakuloj, estos bonaj ŝancoj por ĝojiga progreso.

Sekve, alilandaj samfakuloj estas urĝe petataj sendi siajn nomojn kaj adresojn al la suba adreso, kun indiko pri sia ofico kaj agopovo rilate al kunlaborado.

Al la esperantistaro ĝenerale ni rekomendas esploran sinturon al aviadaj rondoj. Provu ĉe la teknikistaj kaj pilotaj rondoj, esploru ĉe pilotaj sindikatoj ktp., se ekzistas tiaj en viaj landoj! Super ĉio, bonvole raportu al ni, por ebligi orientadon pri la eblecoj de internacia kunlaboro.

Adreso: *Aviado, ĉe Brita Esperantista Asocio, 142, High Holborn, Londono, W.C.1., Anglujo.*

(E.D. Durrant,
por Propaganda Komitato BEA.)

Londono, la urbo de la 30-a Sukceso ĉe grava internacia asocio en Anglujo

KIO ESTAS LA CITY ?

La vizitanto al Londono, kiu ofte aŭdas la vorton « City », eble sufiĉe bone konas la anglan lingvon por scii, ke tiu vorto signifas « urbego », kaj precipe urbego kie troviĝas katedralo. Rilate al Londono, tamen, la vorto estas honorata per majusklo; ĝi estas nomo kaj havas apartan signifon. La vorto City, do, ne indikas la tutan urbegon, sed nur relative etan regionon en la mezo kun propra administracio.

En tiu ĉi loketo (2 kv. km.) troviĝas la borso, la bankoj, la amaso da oficejoj kiuj faras Londonon la komerca kaj financa centro de la mondo. Tien ĉi migras ĉiutage centmiloj da geoficistoj kiuj loĝas en la eksteraĵoj. Matene el ĉiuj direktoj ili fluegas en la City'n kaj vespere milope ili rapidas hejmen. Sed tio ne okazas dimanĉe, kaj je tiu tago la City estas preskaŭ timige silenta kaj senhoma. Efektive, krom kelkcent domzorgantoj, preskaŭ neniu alia loĝas tie.

Gia origino.

La City fidele reprezentas la originalan urbeton kiu naskiĝis antaŭ du mil jaroj kaj dum tiu longa tempo kreskadis ĝis la nuna koloso. Frue dum la romana okupado, en la unua jarcento, la brita reĝino Boadicea kun sia armeo atakis la urbon kaj forbruligis ĝin. Tuj poste, do, la romanoj konstruis fortikan muron ĉirkaŭ la urbon kiel defendon kontraŭ pluaj atakoj, kaj la distrikto, kiun enfermis tiu muro, estas la nuna City.

En la katastrofa brulego de la jaro 1666, pereis okdek procentoj de la City, sed poste oni rekonstruis ĝin pli malpli laŭ sama formo kiel antaŭe, kaj pro tio la plej multaj stratoj montras la formon kiun ili havis dum la romana epoko.

Gia ĉarmo.

Krom la ne tre multaj ĉefstratoj, la City konsistas el centoj da mallarĝaj stratoj, vojoj, kaj antikvaj kaŝitaj kortoj kie ŝajnas vagi fantomo el antaŭaj epokoj. La nomo de ĉiu el tiuj stratoj kaj kortoj estas plena de signifo, kaj la tuto liveras facile legeblan historion de la pasinteco. Al turisto, tio estas la ĉefa ĉarmo de la City, la mallarĝaj stratoj kaj la kvazaŭ perditaj vojetoj kaj kortoj kiujn dimanĉe li trovas en morta silento. For estas la rapidantaj homamasoj, for la miloj da aŭtobusegoj kaj la konfuzo kaj bruo, kaj tute komforte li povas esplori tiun loketon, riĉan je intereso, kies dumjara ekzisto tiom elstaras en la brita historio.

En Londono, kaj precipe en la City, ankoraŭ abundas pitoreskaj ceremonioj kiujn vivigas la brita amo al tradicio. Unu el la plej trafaj, kiu, cetere, bone

Bonvolu kunhelpi !

La *International Friendship League* (Internacia Ligo de Amikeco) fondiĝis en Anglujo en la jaro 1931 kun la celo krei amikecon inter la gejunularo de diversaj landoj ĉefe per la organizado de internaciaj libertempaj hejmoj. Kvankam la Ligo estas plej forta en Britujo, kie ĝi havas 8000 membrojn, ĝi nun havas ankaŭ naciajn sekciojn en multaj aliaj landoj, kun entute proksimume 3.500 membroj.

Dank' al la fervora laborado de kelkaj samideanoj en Britujo, la Ligo oficiale estas tute amikema al nia lingvo, kaj lastatempe ĝia intereso tiurilate multe pligrandiĝis. En 1935, ekzemple, en la britaj sekcioj de la Ligo okazis unu kurso kun 15 membroj, kaj en 1937: 12 kursoj kun 133 membroj, fakto kiu rikoltis aproban mencion en la lasta jara raporto. Oni scias, ke multaj Liganoj studas Esperanton ankaŭ ekster oficialaj kursoj.

La internacian agadon de la Ligo kontrolas t.n. « Ĝenerala Komitato ». Tiu ĉi komitato okazigis kunvenon de siaj membroj en Bruselo lastan oktobron, kaj estas aparte interese al ni, ke laŭ posta raporto en la oficiala gazeto de la Ligo *la KUTIMA LINGVA MALFACILAJO APERIS*, tiel ke oni devis uzi la francan lingvon, kun la angla nur kiel traduklingvo !

Meze de februaro okazis proksime al Londono la jarkunveno de la Ligo, kiun ĉeestis 160 delegitoj el pli ol 50 filioj. Nia Londona samideano F.C. Midas, kiu en Anglujo plej laboras por enkonduki Esperanton en ĉi tiun organizaĵon, proponis la jenan rezolucion: Ke tiu ĉi konferenco rekomendu al la anoj de la Ĝenerala Komitato ke ili scipovu sufiĉe da Esperanto por fari sian laboron, kaj ke la dokumentoj de la Ĝenerala Komitato aperu ankaŭ en tiu lingvo. La proponon subtenis s-ro D. E. Hughes, nesperantista prezidanto de Sud-Londona Filio. Tuj s-ro Noel Ede (fondinto de la Ligo) proponis jenan amendon: *ke tiu ĉi konferenco invitu la diversajn naciajn sekciojn, pristudi la demandon de Esperanto kiel la lingvo uzota en inter-*

montras la sendependecon de la City, estas la fakto ke la reĝo nepre ne rajtas eniri la City'n ĝis li petas kaj ricevas la permeson de la urbestro, kiu ĉiam ceremonie renkontas lin ĉe la limo. Plue, dum la reĝo restas en la City, la urbestro range superas ĉiun el liaj akompanantoj. Tiuj tradicioj servas por memori pri la longa batalo de la Londonanoj kontraŭ la monarkio por la libereco kaj rajtoj de sia urbo.

E. W. Amos.

naciaj kunvenoj de la Ligo.

Tiu lasta propono estis akceptata kun nur 7 kontraŭvoĉoj !

Ĉi tiu promesplena rezulto el la laboro de s-ro Midas kaj aliaj havas jenan signifon: Post ok monatoj okazos kunsido de la nomita Ĝenerala Komitato, sur kies tagordo devus esti la supra rezolucio. *Antaŭ tiu kunveno ni devos konvinki la diversajn reprezentantojn kaj naciajn filiojn pri la nepra indo de nia lingvo.*

Samideanoj en Aŭstrujo, Belgujo, Danujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Nederlando, Svedujo kaj Svisujo — elserĉu la vialandajn naciajn societon kaj komitatanojn de Internacia Ligo de Amikeco kaj certigu ke ili voĉdonu *POR* la supra rezolucio.

E. W. Amos, ĉe IEL, Anglujo.

(La adreso de la sekretario de la « Ĝenerala Komitato » estas: S-ino M A. Nyssens, 31, Avenue de la Chasse, Bruselo.)

Pedagogia Enciklopedio kaj Esperanto

Sub titolo « Kultura donaco al ĉeĥoslovaka lernejo » aperas en Praha (Ĉeĥoslovakujo) grava verko **Pedagogia Enciklopedio**, kies unua volumo estas jam preta, la dua kaj tria finpresataj. Famaj pedagogiaj fakuloj redaktas ĝin, nome: profesoroj **O. Chlup, Josef Kubálek** kaj **Josef Uher** en kunlaboro kun multegaj ĉeĥaj instruistoj. Tiu ĉi verko de eminentuloj el la ĉeĥoslovaka mondo pedagogia garantias la precizecon kaj multvaloron de la PE, kiu enhavas detalajn informojn pri ĉiu demando, kiu interesas la instruiston, pedagogon kaj filozofon. La riĉenhava kaj moderna verko liveras al ĉiu leganto klarigon de grandega kvanto da objektoj kaj ideoj el ĉiuj fakoj de arto pedagogia, pri filozofio, didaktiko kaj parencaj sciencoj. Plue ĝi havas biografion de la pedagogiaj fakuloj, tiel ke ĉiu ĝia posedanto havas vere perfektan vortaron pedagogian, tiom necesan kaj jam delonge sopiritan.

Grava kaj gratulinda afero estas, ke la redakcio sciis taksu, kiel grandajn servojn donas Esperanto al la instruistaro. La jam aperinta unua volumo enhavas **du artikolojn** de faka instruistino **Julie Supichová**, nome « Esperanto » (paĝo 396) kaj « Lingvoj internaciaj » (558). En la verko de tia grava kultura valoro, kia estas PE, ĝi estas vera sukceso!

(Dankleteroj estu adresataj al redaktoro: Profesoro Josef Kubálek, Jeronymova 16, Praha-Smíchov, CSR.)

BONVOLU KOREKTI !

En la antaŭrimarko de la redakcio al la artikolo de s-ro gen. Bastien (« Ni komune laboru! »), en nia pasinta numero, kvara linio de malantaŭe, legu: **ĉiumonate** (anst. iumonate); en la dua linio de la sepa alineo de la artikolo mem legu: La **neneŭtralaj** asocioj (anst. La neŭtralaj asocioj), kaj en la sesa/sepa linioj de la dekkvina alineo legu: pere de la esperantista **neneŭtrala** asocio (anst. pere de la esperantista neŭtrala asocio).

14-a de Aprilo 1917

Kaj tiel, rapide, nin lasas
La jaroj: dek, dudek, kaj pli.
Someroj kaj vintroj sin ĉasas.
Ke ankaŭ ni dume forpasas,
Ĝin preskaŭ ne sentas ni.

Milito la torĉon levis,
Ruĝiĝis pro sang' l' horizont',
Ĉe l' frontoj l' obusoj diskrevis,
Dum majstron la toambo ricevis. —
Apenaŭ atentis la mond'.

Delonge la majstro humila
Jam kuŝas en toambo sub ter':
La mondo ne iĝis tranĝvila,
Ja eble eĉ pli senkonsila,
Kaj ĝemas sub prema mizer'.

Sed iam radio trafendos
La nokton en vasta la rond':
Popoloj ne plu sin ofendos,
Sed fide la manojn etendos, —
Kaj majstron akĝlamos la mond'!

T. J.

La Stelo Bela

Mi havas en mia biblioteko libron de indian-rakontoj, tre ĉarmaj rakontoj por infanoj. La titolo de unu rakonto estas: « Mia Stelo Bela ». Ĝi estas rakonto pri eta indiano, kiu amis la stelojn eĉ pli ol li amis siajn gefratojn.

Ĉiuvespere li iris al la supro de malalta monteto por rigardi la stelojn. Unu el ili ŝajnis al li pli hela kaj pli bela ol la aliaj.

« Ĝi estas mia Stelo Bela! » li diris, kaj ĉiuvespere li grimpis sur la monteton por rigardi sian stelon. Tuj kiam ĝi aperis kaj forsendis siajn unuajn radiojn, li diradis: « Bonvenon, bonvenon, mia Stelo Bela! ».

Ne ĉiam la stelo aperis, ĉar densaj nuboj de tempo al tempo kaŝis ĝin. Tiam la knabo diradis: « Stelo Bela, vi estas tie, mi scias, kvankam mi ne povas vidi vin ».

La jaroj pasis, kaj la eta knabo fariĝis brava, forta junulo; neniŭ en la tribo estis pli brava ol li. Pri fiŝkaptado kaj pri ĉasado li estis tre lerta, sed li ne fanfaronis pri tio, sed ĉiam diradis: « Stelo Bela, estas vi, kiu donas al mi lertecon ».

Pasis ankoraŭ aliaj jaroj, kaj la junulo fariĝis plenkreska viro. Eĉ pli lerta li nun estis ol antaŭe, kaj li ĉiam diradis: « Estas vi, mia Stelo Bela, kiu gvidas min al la arboj, kie sin trovas la bestoj, kaj al la rivero, kie fiŝoj abundas ».

Jaroj pasis, kaj la brava ĉasisto fariĝis maljunulo. Ĉiuj amis lin; kaj kiam li ne plu povis fiŝkaptadi aŭ ĉasadi, la aliaj ofte venadis al li por peti de li konsilojn; kaj ĉiam li donis bonajn konsilojn, ĉar li ankoraŭ diradis: « Estas mia Stelo Bela kiu gvidas min ».

Kaj kiam post longa tempo la maljun-

HEROOJ

Amikoj, mi volas paroli pri aliaj herooj, herooj, kiuj ne ekzistas en viaj lernolibroj.

Kiuj estas la herooj de viaj lernolibroj? Hanibalo, Aleksandro la Granda, Napoleono 1-a. Kio estis la celo de iliaj deziroj, la sopiro de iliaj noktoj? Neniigi la kontraŭulon, sangbati la « malamikon ». Kion faris viaj historiistoj? Ili laŭdas la gloron, famigas la grandecon, glorumas la agojn. Ĉu vi jam pripensis, en kio konsistis la « grandaj faroj » de la tiel nomitaj herooj? Ĉu vi scias, ke ili mortigis homojn, detruis urbojn kaj vivaspirojn? Ĉu vi scias, ke ili disigis patrinojn de iliaj filoj, edzojn de iliaj edzinoj; kaj pelis ilin en barbarajn batalojn? Kaj strange: Oni ne estimas la merititan glorbilion de tiuj, kiuj mortis; oni nur estimas la heroojn, oni estimas la pelitajn, ne la pelitojn.

Ĉu ni ankoraŭ miru, ke niaj junuloj revas pri « herooj » agoj kaj ke amas mortigojn ili rigardas diaj kaj herooj? Ĉu ni miru, ke ili, puŝate de falsa ambicio, volas imiti « kuraĝajn prototipojn », ke ili pro junula entuziasmo sopiras pri militaj agoj?

Ni devas ŝanĝi nian ideologion, ĵeti en la maron niajn lernolibrojn kun la poeziaj laŭdoj pri la grandaj militerooj. Ne, ili ne estas la grandaj herooj! Estas jam tempo, ke ni forŝiru la maskon de ili.

ulo malsaniĝis kaj estis mortonta, li vokis al si siajn amikojn kaj diris: « Mi iros nun al mia Stelo Bela, ĉar dum mia tuta vivo la stelo estis gvidanta min, kaj nun ĝi atendas mian alvenon ».

Samideanoj, ni ankaŭ havas nian Stelon Belan. Ĝi estas la Verda Stelo de la tutmonda esperantistaro. Antaŭ kvindek jaroj ĝi ekaperis en malgranda urbo en Pollando. Nur unu homo vidis ĝian malfortan brileton. Sed jaroj sekvis jarojn, kaj ĝia brileto fariĝis brilado. Hodiaŭ la lumo de nia Stelo Bela, de nia Verda Stelo, estas vidata en ĉiuj partoj de la mondo; de la nordo ĝis la sudo, de la oriento ĝis la okcidento.

En kelkaj lokoj pezaj nuboj kaŝas ĝian briladon, sed la fidelaj samideanoj ne perdas la esperon, sed diras, same kiel diris la indiano: « Stelo Bela, mia Verda Stelo, vi estas tie, mi scias, kvankam mi nun ne povas vidi vin. Sed iam la nuboj malaperos, kaj denove mi vidos vin, mia Stelo Bela ».

Karaj samideanoj, en mondo militanta, kie regas malamo, malpaco kaj malbono, ni bezonas la briladon de nia Stelo Bela, de nia Verda Stelo. Ni sekvu ĝian briladon, ĝis la mondo militanta fine fariĝos unu granda rondo familia.

D-ro Lehman Wendell,
Minneapolis, Usono.

La veraj herooj ne instruas malamon kaj ne sangavidas, ne predikas subpremon kaj ne instigas al mortigado. La veraj herooj venas kun la vorto « amo ». Ili scias, ke ĉiuj homoj estas fratoj. Ili ankaŭ konkeras novajn regnojn, sed per la eternaj bataliloj de la spirito.

Kio restis de la verko de Hanibalo, kio estas la vivoverko de Aleksandro la Granda, kio restis de la militoj Napoleona?

Sed la vortoj de Moseo, Kristo, Budho, Aristotelo, Spinoza, Kant, Newton, Zamenhof kaj aliaj estas kaj restas vivantaj. Ili estas ĉerpitaj el la fonto de l' eterneco.

Ni bezonas novajn heroojn, heroojn de la spirito, heroojn de la koro; heroojn, kiuj nin gvidas supren sur la altaĵojn de la vivo, kaj kiuj ne puŝas nin al sangaj malvirtoj. Ni sentas: devos nepre esti alie, pli lume, klare, libere. Ĉio putranta kaj malsana devas forlasi la mondon, ni bezonas novajn batalantojn, soldatojn en nova armeo de la lumo.

Nia ĉefbatalilo estu la spirito, nia forto la volo. El la rubo kaj la ruinaĵoj de la mondmilito devas estiĝi io nova kaj io sana. Tio nova estas: paca vivo de ĉiuj homoj sen diferenco de deveno, konfeso kaj nacio. Tio sana estas: kreado de ekonomia bazo, kiu evitas riĉulojn kaj malriĉulojn, kapitalistojn kaj proletojn. La homo vekiganta al nova estado volas rajtojn al vivo kaj laboro. Li ne volas plu esti duoninfano de la vivo. Liaj okuloj servu por ekkoni la belecon de la mondo, kaj per siaj oreloj li aŭskultu belajn sonojn el la vivo. La vojo devas esti libera por la nova homo, kiu volas krei mondon alian. La nova homo volas homrajton. Vekiĝu kaj levu vin! Vekiĝu! Vin koncernas la voko, kiuj vi travivis la suferojn de la mondmilito! Kion vi nomis vivo, tio estis nur krepusko. Vekiĝu el la perforte altrudita dormostato kaj rigardu per novaj okuloj ĉirkaŭ vin! Novaj torĉoj ekbrulis! Ne estingu ilin! Ili lumas por vi! Ekbruligu novajn torĉojn de libereco, samrajteco kaj homeco!

Nun devas fine ekesti lumo. Milionojn da torĉoj oni bezonas. Ekbruligu ilin! Tie — ĉi tie — ĉie!
D-ro A. M.

Ni funebras

— S-ro CHARLES BARNES, delegito de IEL en Colchester, Anglujo, mortis la 15-an de februaro, 69-jara. Malgraŭ sia malsano dum la lastaj jaroj, tiu ĉi samideano daŭrigis ĉiam entuziasme labori por nia movado, kaj lia forpaso estas dolore sentata de ĉiu esperantisto en orienta Anglujo.

Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo.

Oficiala Informilo

N-ro 68. 24-an de Februaro, 1938

FAKA ASOCIO.

Kontrakto pri komuna laboro estas farita laŭ paragrafo 14 de la Statuto kun jena Faka Asocio:

Kvakera Esperanto-Asocio.

NOVAJ DELEGITOJ.

Aŭstrujo.

Kremsmünster (O.Ö.): — D: A. Trenzinger.

Britujo.

London. — FD. (Eksporto): F.C. Midas, 24-b, Clifton Gardens, London, W.9.

Bulgarujo.

Asenovgrad. — D: D. Andreev, str. Čarasen 36.

Danujo.

Aabyhøj. — FD. (Elektrotekniko): L. Jakobsen, Carit Etlarsvej 14.

Hovedgaard. — D. kaj FD. (Fervojistaj aferoj): K. B. Astrup, Hovedgaard Station.

Nyköbing Fl. — D: F-ino E. Rasch, Nagelstis-skole.

Roskilde. — D: V. Sylvest, Hedehusene.

Polujo.

Lódz. — VD: F-ino M. Holtorp, Miedziana 6.

ADRESOŝANĜOJ.

Ĉeĥoslovakujo.

Trnava. — D: N. Lelovits, Rezna ul.

Svedujo.

Skara. — VD: G. Nykvist, Box 80.

MEMBRO-SUBTENANTOJ.

96. C. F. Hayes, London, Anglujo.

97. P. Möller, København, Danujo.

98. D-ro P. Dolák, Spišské Vlachy, Ĉeĥosl.

99. D. Andreev, Asenovgrad, Bulgarujo.

100. W.M.P.J. Holzhaus, Amsterdam, Nederl.

LONDONA KONGRESO, 1938.

Aliĝoj ĝis hodiaŭ: 960 el 25 landoj.

C. C. GOLDSMITH,
Generala Sekretario.

Oficiala Informilo

N-ro 69. 2-an de Marto, 1938.

NOVAJ DELEGITOJ.

Aŭstrujo.

Knittelfeld. — D: F. Karat, Weyerngasse 30.

Jugoslavujo.

Beograd. — FD. (Komerco): V. Muskatirović, Kralja Aleksandra ul. 136.

Dubrovnik. — FD. (Skoltismo): J. Baselli, Strosmyerova 4.

Valjevo. — D: B. Colic, Vojvode Misica br. 15.

Nederlandindio.

Medan (Sumatra). — D: W. G. van Eyndthoven, Padang Boelanweg 60-pav.

Nov-Zelando.

Lower Hutt. — D: W. E. Currie, 27, Queens Road.

Petone. — D: H. W. Thomas, 47, Adelaide Str.

Shag Point. — D: G. W. Parkyn, Shag Point, Otago.

FD. (Instruistaj aferoj): La D.

Wellington. — D: G. Blong, P. O. Box 330, Wellington, C. 1.

VD: F. A. Bailey, P. O. Box 1486.

FD: (Gazetservo) A. Vogt, P.O. Box 330.

FD. (Instruistaj aferoj): E. A. Hornblow, c/o Education Department.

FD. (Komerco): N. Hill, 166, Sydney Street.

FD. (Presado): J. H. Thomas, 23, Adams Terrace.

FD. (P. T. T.): W. H. King, Room 47, G.P.O.

FD. (Teatraj aferoj): F-ino F. M. Bennett, 40, Garden Road, Northland.

Polujo.

Lublin. — D: E. Majewski, 1-go Maja 43 m. 3.

Zgierz. — D: S.R. Hierowski, ul. Pawlowskiego 2

Svedujo.

Ekshäräd. (Värmland). — D: N. R. Anderwall, Basterud, Rada.

Usono.

Arlington (Massachusetts). — D: G. I. Savage, 68, Westmoreland.

Boston (Massachusetts). — D: H. B. Hastings, Box 250.

MEMBRO-SUBTENANTOJ.

101. F-ino A. L. Borel, London, Anglujo.

102. J. Delor, Tlemcen, Alĝerio.

103. I. H. Wright, Birmingham, Anglujo.

104. S-ino F. Reaver, London, Anglujo.

105. F-ino J. B. Hopps, San Francisco, Usono.

106. R. Robertson, London, Anglujo.

MONATA STATISTIKO.

Membraro.

Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de Februaro 1938, kaj ankaŭ (por komparo) ĝis la fino de Februaro 1937.

	Feb. 1938	Feb. 1937
AM.	1843	1200
MJ.	510	389
MA.	580	505
MAH.	227	194
MS.	102	100
PAT.	4	8
DM.	72	75
HM.	29	31
Sumo	3367	2502

Korespondajoj.

Centra Oficejo (sen la gazetoj) dum Februaro, 1938:

Ricevitaj	740
Senditaj	925

1665

C. C. GOLDSMITH,
Generala Sekretario.

INTERNACIA KONKURSO 1938.

Stato je la 28a de Februaro 1938.

POENTOJ

	1937	1938	%
1. Jugoslavujo	257	463	180.0
2. Polujo	318	527	165.7
3. Svislando	137	223	162.8
4. Latvujo	55	86	156.4
5. Finnlando	61	92	150.8
6. Bulgarujo	92	127	138.0
7. Litovujo	135	134	99.3
8. Portugalujo	317	233	73.5
9. Belgujo	1722	1158	67.2
10. Britujo	6183	3797	58.5
11. Aŭstralio	429	237	58.2
12. Hungarujo	619	340	54.0
13. Afriko	137	74	54.0
14. Danujo	1118	559	50.0
15. Usono	1513	740	48.9
16. Sud-Ameriko	851	377	44.3
17. Rumanujo	50	22	44.0
18. Kanado	74	32	43.2
19. Aŭstrujo	789	306	38.8
20. Nederlando	2837	1066	37.6
21. Svedujo	3024	1069	35.3
22. Ĉeĥoslovakujo	2449	810	33.1
23. Italujo	636	205	32.2
24. Francujo	5907	1544	26.1
25. Norvegujo	792	196	24.7
26. Azio	1321	325	24.6
27. Nov-Zelando	265	25	9.4
28. Grekujo	137	—	—

32525 14767 45.4
Meza %

Oficiala Informilo

N-ro 70. 11-an de Marto, 1938.

NOVAJ DELEGITOJ.

Bulgarujo.

Varna. — D: G. H. Dimov, Bul. Dobriš 18.
VD: H. M. Cvetkov, Str. 6 Septembro 12.

Ĉeĥoslovakujo.

Lucenec. — D: V. Král, Nádraží.

Norvegujo.

Sandefjord. — FD. (Skoltismo): J. Berggreen (La D.).

Siamo.

Bangkok. — D: Wen Chi-ching, Teck Heng Joo Dispensary, Charoen Krung Road.

MEMBRO-SUBTENANTOJ.

107. A. de Vries, Soest, Nederlando.

108. Pastro E. N. Thomas, Stafford, Anglujo.

109. G. H. Parker, London, Anglujo.

110. C. A. A. Haccou, Djokjakarta, Nederlandindio.

UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO 1938.

Aliĝoj ĝis hodiaŭ 1006 el 25 landoj.

C. C. GOLDSMITH,
Generala Sekretario.

Unueco estas Forto

Oficiala Informilo

N-ro 71. 18-an de Marto, 1938.

NOVAJ DELEGITOJ.

Britujo.

Braintree. — D: Pastro E. Rogers, The Leinery, Bocking.

Colchester. — D: F-ino E. Walters, 36, Crefield Road.

Hawick (Skotlando). — D: W. T. Samuel, ĉe S-ino McQueen, « Ferniehurst », Lockhart Place.

Francujo.

Bonnières sur Seine. — D: G. Lefebvre. Hôtel de Ville.

Litovujo.

Alytus. — D: V. Maknickas, Valstybine gimnazija.

Maroko.

Casablanca. — VD: G. Bastide, 61, Avenue Pasteur.

Nederlando.

Heerlen. — D: F-ino T. Flint, Geleenstraat 66.

Middelburg. — D: J. F. Drost, Noordweg 82.

ŜANGO.

Britujo.

Oban. — Pro translokiĝo provizore ne estas D.

—o—

GRAVA NOTO: Kelkaj el la supraj informoj venis tro malfrue por enmeto en la jarlibron 1938.

—o—

MEMBRO-SUBTENANTOJ.

111. J.R. Miller, Stone, Anglujo.

112. C.M. Hamaker, Hilversum, Nederlando.

113. S-ino C.M.H. Hamaker van Haeften, Hilversum, Nederlando.

JARLIBRO.

La Jarlibro estas nun presata kaj aperos je la fino de Marto. Ĝi enhavas proksimume 350 paĝojn kun multaj novaj kaj utilaj rubrikoj.

UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO 1938.

Aliĝis ĝis hodiaŭ 1028 el 25 landoj.

C. C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario

Oficiala Informilo

N-ro 72. 24-an de Marto, 1938.

NOVAJ DELEGITOJ.

Bulgarujo.

Sofia. — VD: E. Stratev, str. Car Asen 50.

Ĉeĥoslovakujo.

Kuttenplan. — D: H. Stark, Kuttenplan apud Marienbad.

ADRESOŜANGO.

Britujo.

Leeds. — VD: J. W. Mann, 10, Davies Avenue, Leeds 8.

PATRONO.

5. S-ino M. C. Gillett, Banbury, Anglujo.

UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO, 1938.

Aliĝoj ĝis hodiaŭ: 1066 el 25 landoj.

C. C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario.

Esperantista Lingva Komitato - Akademio

(Adreso: Oostduinlaan, 32, Hago, Nederlando)

Oficialaj Sciigoj de la Akademio

(N-ro 14 — Februaro 1938)

1. Listo de difinoj de vortelementoj.

Kiel mi jam anoncis en la 13-a numero de « Oficialaj Sciigoj de la Akademio » (Oktobero 1937), la Akademio entreprenas la starigon de listo de la difinoj de la vortelementoj de Esperanto. La procedo estos la jena: Unua listo de 100 vortelementoj de la « Universala Vortaro » kaj de ĝiaj 6 « Oficialaj Aldonoj », kiun mi kunmetis post interkonsiliĝo kun S-ro W. Bailey, Direktoro de la Sekcio por la Komuna Vortaro, estas sendata kun ĉi tiu bulteno kiel « Publika Propono » al ĉiuj Akademianoj kaj LK-anoj kaj al ĉiuj Esperantaj gazetoj kun la peto represigi ĝin. Mi invitas ĉiujn Esperantistojn sendi al mi, se eble antaŭ la 15-a de Majo 1938, siajn rimarkojn, korektojn, kritikojn, proponojn ktp. pri la apartaj difinoj de la listo, prefere por ĉiu vortelemento sur aparta slipo. Oni povas proponi korektojn, modifojn de la difinoj por igi ilin pli klaraj, aldonajn signifojn ktp. Mi speciale petas la helpon de fakuloj, precipe de botanikistoj kaj zoologistoj, por kritiki la latinajn nomojn, kiujn mi aldonis al la nomoj de plantoj kaj bestoj por difini ilin tute precize.

Post la pristudo de la envenintaj rimarkoj mi pretigos novan liston, kiun ricevos nur la Akademianoj. Ili voĉdonos pri ĉiu difino aparte. Poste la listo de la akceptitaj difinoj estos submetata al la Lingva Komitato por definitiva aprobo.

Post ĉiu vortelemento estas notitaj interkrampoj unu aŭ kelkaj literoj por fiksi ĝian gramatikan karakteron. La signifoj de la mallongigoj estas: s=substantivo, a=adjektivo, v=verbo, v tr=verbo transitivo, v ntr=verbo netransitiva, n=neŭtrala. Plue (fig) signifas: figure uzate.

Por ŝpari senutilajn poŝtelspezojn, la estontaj numeroj de la « Oficialaj Sciigoj », kiuj pri-traktos nur la « Liston de difinoj », estos sendataj krom al la LK-anoj nur al tiuj gazetoj, kiuj deklaris sin pretaj represigi la « Publikajn Proponojn ». Mi do petas la redaktorojn de la gazetoj, kiuj ricevas tiun ĉi bultenon, informi min kiel eble plej baldaŭ, ĉu ili deziras pluan alsendon de la koncernaj listoj.

2. Sendo de Esperantaj libroj kaj gazetoj al la Akademio.

Mi volas refoje direkti la atenton de la Esperantaj eldonistoj al mia peto en la antaŭa numero de ĉi tiu bulteno, sendi al mi unu ekzempleron de ĉiu libro kaj de ĉiu gazeto, kiun ili eldonas. Tiun peton mi volas kompletigi per la peto samtempe daŭrigi la sendon de unu ekzemplero al la Direktoro de la Sekcio de Kontrolo, S-ro M. Rollet de l'Isle, 35 rue du Sommerard, Paris 5-e, Francujo. Al la eldonistoj, kiuj jam respondis al mia antaŭa alvoko per la sendo de siaj eldonaĵoj mi esprimas per ĉi tio koran dankon. Sama danko apartenos al tiuj eldonistoj, kiuj estonte bonvolus plenumi miajn ĉi suprajn petojn.

Ir. J. R. G. Isbrücker, Prezidanto.

Difinoj de vortelementoj (Publika propono)

1-a Listo.

1. **-a** (a) : 1) unua litero de la alfabeto; 2) finaĵo de la adjektivo aŭ de adjektiva pronomo aŭ numeralo, signifanta: a) kiu havas econ, b) kiu rilatas al.

2. **abat'** (s) : estro de monaĥejo.

3. **abdik'** (v tr) : formale demeti ĉiujn rajtojn je la trono aŭ je altranga ofico.

4. **abel'** (s) : insekto el la subklaso de himenopteroj, kiu produktas mielon (Apis).

5. **abi'** (s) : arbo el la familio de koniferoj (Abies).

6. **abism'** (s) : 1) loko kun profunde malproksima fundo, kun krutaj flankoj; 2) (fig.) nemezureble granda grado de mizero aŭ nesidado.

7. **abiturient'** (s) : mezgrada lernanto, kiu finis la gimnazian kursaron kaj sukcese plenumis la koncernen ekzamenon.

8. **ablativ'** (s) : kazo de la deklinacio en diversaj lingvoj, kiu esprimas instrumenton aŭ devenon.

9. **abnegaci'** (s) : forlaso de propraj komfortaĵoj kaj ĝuoj por la bono de aliaj.

10. **abomen'** (s) : sento, kaŭzata de tre malagrablaj ecoj de persono aŭ objekto.

11. **abon'** (v tr) : mendi per antaŭpago por difinita tempo gazeton, fervojbiletojn k.s.

12. **abort'** (v tr) : naski antaŭtempe nevivipovan idon.

13. **abrikot'** (s) : frukto de arbo el la familio de rozacoj (Prunus Armeniaca).

14. **abrupt'** (a) : 1) tre kruta, kvazaŭ fortranĉita; 2) malagrabla, neatendite subita.

15. **absces'** (s) : amaso de pusoj en histoj.

16. **absint'** (s) : 1) forta, verda likvoro, preparita el la samnoma vegetaĵo; 2) aroma vegetaĵo el la familio de kompozitoj (Artemisia Absinthium).

17. **absolut'** (a) : 1) tute sendependa de ĉia povo aŭ kontrolo; 2) kies aŭtoritato estas despota, aŭtokrata; 3) senkondiĉa, nerelativa; 4) senmiksa, ĉie pura; 5) gramatike nedependa de la entenanta frazo.

18. **absorb'** (v tr) : 1) tute okupi la spiriton aŭ la atenton de iu; 2) tute enpreni en si kaj ne redoni.

19. **abstin'** (v ntr) : sin deteni, pro principo, de la uzado de alkoholo, tabako ktp.

20. **abstrakt'** (a) : 1) estanta neperceptibla de la sentoj, malkonkreta; 2) konsiderata aparte de la tuto, al kiu ĝi apartenas.

21. **absurd'** (a) : kontraŭa al la komuna logiko, prudento aŭ scio.

22. **abund'** (a) : estanta en granda kvanto aŭ nombro, pli ol sufiĉa.

23. **acer'** (s) : arbo el la familio de aceracoj (Acer).

24. **acet'** (v tr) : akiri la posedrajton de io per pago de mono.

25. **acid'** (a) : havanta akran guston kiel vinagro aŭ citrono.

26. **-ac'** (n) : sufikso, esprimanta malbonecon, malbonan kvaliton, malŝaton.

27. **-ad'** (v) : 1) sufikso, esprimanta agon aŭ staton, kiam ĝi sekvas neverban radikon; 2) sufikso, esprimanta daŭran aŭ ripetatan agon aŭ staton, kiam ĝi sekvas verban radikon.

28. **adapt'** (v tr) : konformigi por specialaj celoj aŭ kondiĉoj.

29. **adept'** (s) : 1) ano de doktrino aŭ sekto; 2) persono, konanta arton aŭ sciencan kaj sin okupanta per ĝi.

30. **adiaŭ** (n) : saluta vorto, uzata ĉe la foriro aŭ disiĝo.

31. **adici'** (v tr) : per aritmetika operacio difini la sumon de kelke da nombroj aŭ kvantoj.

32. **adjektiv'** (s) : vorto, aldonata al substantivo por esprimi kvaliton.

33. **adjutant'** (s) : oficiro, konstante akompananta sian ĉefon kaj komunikanta liajn ordonojn al la subuloj.

34. **administr'** (v tr) : prizorgi la funkcion, precipe financon, de organizaĵo aŭ entrepreno.

35. **administraci'** (s) : 1) administrantaro; 2) administrero; 3) administrado.

36. **admir'** (v tr) : rigardi kun sento de honoro, estimo, ŝato, respekto.

37. **admiral'** (s) : ĉefo de milita ŝiparo.

38. **admiralitat'** (s) : 1) estraro de ŝiparo; 2) oficejo de la estraro de ŝiparo.

39. **admon'** (v tr) : instigi per vortoj al la plenumo de deo.

40. **adopt'** (v tr) : 1) alpreni per oficiala, laŭleĝa akto iun kiel sian propran infanon; 2) alproprigi al si iun spiritan posedaĵon, opinion, manieron.

41. **ador'** (v tr) : 1) respekti kaj honori kiel dion; 2) amegi.

42. **adres'** (s) : 1) preciza loĝloko de persono, difinita per strato, urbo ktp.; 2) surskribo sur koverto aŭ pakaĵo, montranta la nomon kaj la precizan loĝlokon de la persono, al kiu ĝi estas sendata.

43. **adstring'** (a) : havanta la econ kuntiri la histojn, kiujn ĝi tuŝas.

44. **adult'** (v ntr) : rompi la geedzan fidelcon.

45. **adverb'** (s) : vorto, aldonata al nesubstantivo por precizigi ĝian signifon laŭ loko, tempo, kvanto, maniero ktp.

46. **advokat'** (s) : 1) juristo, rajtigita por pledi en juĝejo por la interesoj de procesanto aŭ de akuzito; 2) iu, kiu subtenas per vortoj aferon, opinion, projekton k.s.

47. **aer'** (s) : miksaĵo de gasoj, plejparte azoto kaj oksigeno, kiu ĉirkaŭas la teron.

48. **aeroplan'** (s) : aparato, pli peza ol la aero, sed kapabla leviĝi kaj moviĝi en ĝi.

49. **afabl'** (a) : 1) kondukanta amike, kun agrablaj vortoj kaj komplezo; 2) esprimanta amikecon, ĝentilecon, komplezon.

50. **afekt'** (v tr) : ŝajnigi ion per nenaturaj manieroj.

51. **afer'** (s) : 1) ĉio, kio estas en la mondo, konkreta aŭ abstrakta, montrata en nedifinita maniero; 2) io, kio estas objekto de pensado, laborado aŭ okupado.

52. **aflikt'** (v tr) : malĝojigi, suferigi morale.

53. **aforism'** (s) : konciza, sencenciĉa principo aŭ penso, rilata al scienco aŭ arto.

54. **Afrik'** (s) : mondparto, troviĝanta sude de Eŭropo, inter la Atlantika kaj la Hinda oceanoj.

55. **ag'** (v ntr) : 1) uzi siajn fizikajn aŭ spiritalajn fortojn por produkti iun efikon; 2) uzi rimedojn por atingi celon.

56. **agac'** (s) : malagrabla sento en la dentoj, kaŭzata de fortaj acidoj.

57. **agat'** (s) : speco de kvarco kun diverskoloraj vejnoj.

58. **agit'** (v tr) : 1) malkvietigi, inciti homojn por politikaj celoj; 2) naski en la animo sentojn, kiuj ĝin maltrankviligas.

59. **agl'** (s) : rabobirdo el la familio de falakoidoj (Aquila).

60. **agoni'** (s) : dolora lasta batalo de mortanto kontraŭ la morto.

61. **agord'** (v tr) : 1) starigi ĝustan rilaton inter la diversaj sonoj de unu aŭ pluraj muzikiloj; 2) inklini iun al iu agmaniero, emigi iun al io.

62. **agrabl'** (a) : kio plaĉas, plezurigas.

63. **agronomi'** (s) : scienco, arto kulturi la teron.

64. **ag'** (s) : tempo, dum kiu vivis homo aŭ besto aŭ dum kiu ekzistis objekto.

65. **agi'** (s) : diferenco inter la nominala kaj la efektiva valoroj de la mono.

66. **ajl'** (s) : vegetaĵo el la familio de liliacoj, uzata kiel spicaĵo (Allium sativum).

67. **ajn'** (n) : vorto, aldonata al pronomoj, adverboj kaj konjunkcioj por insisti pri la nedifiniteco.

68. **-aj'** (s) : 1) sufikso, esprimanta konkretan, materian objekton, karakterizatan de la radiko; 2) sufikso, esprimanta la eksteran montriĝon de sento.

69. **akademi'** (s) : supera lernejo, universitato; 2) oficiala societo de sciencistoj, literaturistoj aŭ artistoj.

70. **akapar'** (v tr) : 1) aĉeti kiel eble plej grandan kvanton de iu komercaĵo por plialtigi ĝian prezon; 2) proprigi al si, kaŭzante malutilon al aliaj.

71. **akar'** (s) : parazita besto el la klaso de araknoidoj (Acarus).

72. **akcel'** (v tr) : plirapidigi kaj samtempe helpi, sukcesigi.

73. **akcent'** (s) : 1) plilaŭtigo, plifortigo de la voĉo sur unu silabo de vorto aŭ sur parto de frazo; 2) aparta parolmaniero, kiu distingas fremdulon aŭ loĝanton de speciala regiono; 3) insisto pri la aparta graveco de certa punkto.

74. **akcept'** (v tr) : 1) konsente ricevi ion, kion oni donas aŭ proponas; 2) lasi vizitantojn eniri en la domon; 3) aprobi, konsenti pri; 4) alpreni, ricevi.

75. **akcesor'** (a) : neĉefa, flanko.

76. **akcident'** (s) : malfeliĉa, neatendita okazaĵo.

77. **akcipitr'** (s) : rabobirdo el la familio de falkoidoj (Astur palumbarius).

78. **akir'** (v tr) : havigi al si per laboro, penado.

79. **aklam'** (v tr) : saluti, akcepti, aprobi per favoraj krioj.

80. **akn'** (s) : patologia ŝvelaĵo de la haŭto.

81. **akompan'** (v tr) : 1) iri kun iu aŭ iu; 2) kunludi per muzikilo kun iu.

82. **akord'** (s) : 1) samtempa harmonia sono de kelke da sonoj; 2) harmonio, rezultanta el komunaj opinioj; 3) ĝusta konveneco inter aferoj.

83. **akrobat'** (s) : cirka gimnastika artisto.

84. **akr'** (a) : 1) havanta maldikan tranĉan randon; 2) havanta pikan pinton; 3) kiu forte ekscitas la sentojn; 4) severa, malmilda.

85. **akrid'** (s) : insekto el la subklaso de ortopteroj, detruanta la grenojn (Acridium, Pachytylus).

86. **aks'** (s) : 1) rekta linio, ĉirkaŭ kiu, efektive aŭ image, turniĝas korpo; 2) cilindroforma stango, ĉirkaŭ kiu turniĝas rado aŭ maŝinparto; 3) centra linio, ĉirkaŭ kiu pli aŭ malpli simetrie grupiĝas sistemo.

87. **aksel'** (s) : kavaĵo sub la artikolo de la ŝultro kaj brako.

88. **akt'** (s) : 1) parto de dramo aŭ komedio, enhavanta kelke da scenoj; 2) oficiala dokumento, atestanta fakton.

89. **aktiv'** (a) : 1) kiu produktas, laboras, agas; 2) kiu gramatike esprimas agon; 3) kiu prezentas la pozitivan parton de propraĵo.

90. **aktor'** (s) : artisto, ludanta rolon en teatraĵo.

91. **akus'** (v ntr) : liberiĝi de matura fetto el la utero.

92. **akuzativ'** (s) : kazo de la deklinacio en diversaj lingvoj, kiu esprimas la rektan komplementon de verbo aŭ la celon de movo.

93. **akv'** (s) : hemia kombinaĵo de hidrogeno kaj oksigeno (H₂O), fluidaĵo, kiu formas la marojn, lagojn kaj riverojn.

94. **al'** (n) : 1) prepozicio, montranta direkton kaj celon de movo; 2) prepozicio, uzata por esprimi la dativon, montrante la destinon de ago; 3) prefikso, esprimanta direkton de movo aŭ destinon de ago.

95. **alaŭd'** (s) : kantobirdo el la familio de knirostroj (Alauda).

96. **alcion'** (s) : birdo el la familio de alcionidoj (Alcedo).

97. **ali'** (a) : 1) diferenca, malsama, ne egala; 2) dua el du personoj aŭ grupoj.

98. **alk'** (s) : speco de norda cervo kun larĝaj, plataj kornoj (Cervus alces).

99. **almenaŭ'** (n) : 1) ne malpli ol; 2) eble aliaj, sed ne.

100. **almoz'** (s) : mondonaco al malriĉulo, kiu petas por tio.

Esperanto en la hungara Parlamento

Grandan sukceson havis en la hungara Parlamento eksministro D-ro Agost Bénard, kiu estas la landa prezidanto de Hungara Esperanto-Federacio, je la 3-a de marto, dum la sekcia pritraktado de reformplano de mezlerneja instruado. Lia moŝto pruvis, ke Esperanto estas necesa por la geknaboj, kiuj ne havas emon lerni fremdlingvojn sed tamen volas labori por sia propra bono, por la patrujo kaj por la homaro. Do li atentigis la kultministron, ke li nepre enkonduku la instruadon de Esperanto, eĉ se komence nur fakultative. Samtempe li refutis la kalumniojn de kelkaj homoj (eĉ deputitoj) kaj fiksis, ke inter la aliĝintaj societoj al HEF eĉ unu ne havas anojn, kiuj apartenus al rondoj framasonaj, komunistaj, socialistaj aŭ bolŝevikaj. Li diris ke, kiu asertas male, tiu estas mense blinda kaj ne povas vidi, ke nia kvinpinta stelo ne estas ruĝa, sed verda.

Oni multe aplaudis kaj gratulis la prezidanton de HEF, kaj la ministro promesis serioze okupiĝi pri la problemo.

Bone efikis ĉe la parlamentanoj la granda propaganda laboro de la esperantistaj popoledukaj kajeroj, kiujn eldonis HEF pri Francisko Rákóczi, pri la hungaraj brodaĵoj ktp. (HEF.)

Internacia Radio-Servo

Tre estimataj radioparolantoj, kursgvidantoj de la sendastacioj, Landaj Asocioj kaj unuopaj samideanoj,

Kiel vi certe scias, ni estas komisiitaj de la Internacia Esperanto-Ligo kompili kaj publikigi ĉiumonate informojn kaj ĉiujare statistikon pri la Esperanto-dissendoj tutmondaj. Pro tio ni hodiaŭ turnas nin al vi kun la peto ke vi, kiel eble plej baldaŭ kaj almenaŭ antaŭ la 15-a ĉiumonate, sendu informojn al ni pri la Esperanto-dissendoj dum la proksima monato.

Ĉar ni, pere de kunlaborantoj en multaj landoj, publikigas informojn pri la Esperanto-dissendoj en ĉiutagaj, fakaj, kaj Esperantaj gazetoj, vi certe komprenas la gravecon regule kaj ĝustatempe informi nin pri la dissendoj el via loka aŭ landa Radio-stacio. Ni substrekas, ke dependas de vi, se nia programo enhavos fidindajn informojn pri la Esperanto-dissendoj tutmondaj.

Ni esperas ke estas eble en tiu ĉi jaro, sur la fundo de la faritaj spertoj kaj per helpo de niaj kunlaborantoj, malnovaj kaj novaj, pligrandigi la sukcesojn kaj servi tiel al nia movado kaj al grava progreso de l'homaro, ĉu Radio, ĉu Esperanto.

Atingi ĉi tiun celon nur estos eble per komuna kunlaborado de multaj laboremaj gesamideanoj tutmondaj. Al ĉiuj, kiuj subtenis nin en la lasta jaro, ni diras ankaŭ per tiuj ĉi liniojn plej koran dankon.

Ni estas certaj, ke ĉiuj ankaŭ en estonteco subtenos nian laboron. Same ni esperas, ke ĉiuj, kiuj ĝis nun staris flanke de niaj penadoj, trovos ankaŭ la vojon al ni por helpi al nia fincelo:

Esperanto kiel Radio-Lingvo!

Internacia Radio-Servo.
Helsingborg 3, Svedujo
Gustav Henriksson, Prez.



OFICIALA INFORMILO N-ro 4.

Adreso por leteroj. — Sekretario, 30a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Kongresejo. — University College, Universitato de Londono.

Kotizoj, £1-10-0. La edzo aŭ edzino de kongresano, kaj gejunuloj ne pli ol 20-jaraj, pagas po 15 ŝil. Estas oportune sendi kotizojn en registrita letero per britaj ŝtataj monbiletoj, haveblaj ĉe bankoj kaj monŝanĝejoj en multaj urboj. Se oni sendas pagojn per poŝtmandatoj, oni ĈIAM sendu samtempe informon pri la NOMO kaj ADRESO de la sendinto kaj la celo de la pago, ĉar la brita poŝtadministracio ne skribas mesaĝojn sur poŝtmandatoj. La poŝtĉekkonta sistemo ne ekzistas en Britujo. Ĉekoj kaj aliaj pagoj estu pageblaj al Internacia Esperanto-Ligo.

Loĝejoj kaj Ekskursoj. — Kun la Marta numero de THE BRITISH ESPERANTIST ni sendis al ĉiu kongresano mendilon por loĝejoj kaj ekskursoj. Oni plenigu ĝin kaj sendu ĝin al la kongresa oficejo kiel eble plej frue, kun la koncerna pago. La komitato ne povas garanti ion al kongresano, kiu ne zorgas plenumas la kondiĉojn.

Donacoj. — La Organiza Komitato volonte ricevos donacojn por helpi al la plena sukceso de la Kongreso. Donacoj jam ricevataj £ 19. 6ŝ. 3p.

Blindula Kaso. — La Organiza Komitato volonte ricevos konacojn por ebligi, ke blinduloj partoprenu la Kongreson. Jam ricevita £ 21. 12ŝ. 8p.

Presajoj. — En la kongresejo kaj kongresaj kunvenoj oni rajtos disdoni cirkulerojn kaj ĉiajn aliajn presaĵojn nur post antaŭa aprobo de la kongresa komitato.

Dokumentaro. — La sama postulo rilatas al presaĵoj disdonataj kun la oficialaj kongresdokumentoj; tio estas, ili devos ricevi la antaŭan aprobon de la komitato kaj devos alveni ĉe adreso indikota, plej malfrue du semajnojn antaŭ la kongreso.

Fakaj Kunvenoj. — Organizontoj bonvolu anonci frue siajn dezirojn. Ni presigos la kongreslibron en majo kaj sendos ĝin al la kongresanoj en junio.

Rabatoj. — La Ĉeĥoslovaka flugkompanio koncedos rabatitan prezon Kc 1211.25 por simpla bileto, Kc 2180.25 por reven-bileto Praha - London - Praha, se anoncos sin almenaŭ 10 vojaĝantoj, ĉe Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubl., Truhlářská 16, Praha II.

AŬSTRUJO. — Kongresanoj montrante siajn kongreskartojn rajtas ricevi rabaton 33 1/3 % en la unua kaj dua klasoj, kaj 25 % en la tria klaso. Tiu rabato validos: por la iro inter la 26a julio-6a aŭgusto, por la reiro inter la 30a julio-14a aŭgusto.

BELGUJO. — Rabato 35%, valida inter 20a julio-20a aŭgusto.

FRANCUJO. — Rabato jam konsentita, sed detaloj mankas.

Kongreskarto kaj Kongreslibro. — Ni esperas sendi ilin al la kongresanoj en junio.

Cseh-Kursoj. — F-ino M. Saxl nun gvidas plurajn kursojn laŭ la Cseh-metodo en Lon-

Sesa listo de kongresanoj

- 26. Kapitano R. Bugge-Paŭlsen, Oslo, Norv
- 27. E. Dahl, Uddevalla, Svedujo.
- 28. Rektoro S. Jansson, Lidingö, Svedujo.
- 29. R. Dubois, Paris, Francujo.
- 30. Prof. G. Canuto, Torino, Italujo.
- 31. G. Scholze, Reichenberg, Ĉeĥoslovakujo
- 976. A.G.D. Stone-Fry, London, Anglujo.
- 977. F-ino S. Obozinski, Bruxelles, Belgujo
- 979. F-ino A. Jennen, Bruxelles, Belgujo.
- 979. F-ino E. Jackson, Crewe, Anglujo.
- 980. F-ino H. Cukiermanówna, Warszawa, P
- 981. F. Fulcher, Sunbury-on-Thames, Angl.
- 982. S-ino M. Andrews, Nottingham, Angluj
- 983. F-ino C. Elgar, London, Anglujo
- 984. A.W. George, Stapleford, Anglujo.
- 985. J. Toczyski, Lwów, Polujo.
- 986. M. J. Fitzpatrick, London, Anglujo.
- 987. E. Sörensson, Landskrona, Svedujo.
- 988. S-ino M.T. Samuel, London, Anglujo.
- 989. F. Merrick, London, Anglujo.
- 990. S-ino A. Fisher, Kew Gardens, Anglujo
- 991. H. A. Towers, Edgware, Anglujo.
- 992. E.R. Penny, Belvedere, Anglujo.
- 993. S-ino E. Penny, Belvedere, Anglujo.
- 994. F-ino M. Kenndy, Glasgow, Skotlando.
- 995. F-ino T.M. Davis, London, Anglujo.
- 996. Prof. J. C. Flugel, London, Anglujo.
- 997. S-ino I. Flugel, London, Anglujo.
- 998. F-ino E. Flugel, London, Anglujo
- 999. F-ino R.E. Crouch, Bromley, Anglujo.
- 1000. F-ino M.L. Blake, London, Anglujo.
- 1001. L. James, Welling, Anglujo.
- 1002. F-ino K.C. Stannard, London, Anglujo.
- 1003. T. Swinburne, Romford, Anglujo.
- 1004. F-ino M. Cripps, Buckhurst Hill, Angl.
- 1005. W.J. Brigden, London, Anglujo.
- 1006. J. Geryk, Novy Jicin, Ĉeĥoslovakujo.
- 1007. L. Jenkins, London, Anglujo.
- 1008. W. Chitty, Dover, Anglujo.
- 1009. J. Alker, St. Helens, Anglujo.
- 1010. S-ino F. Alker, St. Helens, Anglujo.
- 1011. F-ino R. Edberg, Uppsala, Svedujo.
- 1012. F-ino G. Fors, Älvkarleobruk, Svedujo.
- 1013. F-ino L. Pettersson, Uppsala, Svedujo.
- 1014. F.H.B. Johansson, Stockholm, Svedujo.
- 1015. C.T.A. King, Sheffield, Anglujo
- 1016. F-ino P. L. De Cock, Aalst, Belgujo.
- 1017. J.V. Samla, Brno, Ĉeĥoslovakujo.
- 1018. S-ino M. Samlova, Brno, Ĉeĥoslovakujo.
- 1019. S-ino S.S. Morison, Edinburgh, Skotlando
- 1020. W.A. Morison, Edinburgh, Skotlando.
- 1021. C. Ambroise, Thouars, Francujo.
- 1022. S-ino Ambroise, Thouars, Francujo
- 1023. M. Ambroise, Thouars, Francujo
- 1024. L. Houzeau, Château de Mesnes, Franc.
- 1025. S-ino Goodliffe, Nottingham, Anglujo.
- 1026. J.A. Chattaway, St. Helens, Anglujo.
- 1027. C.M. Hamaker, Hilversum, Nederlando
- 1028. S-ino C.M.H. Hamaker, Hilversum, Ned.
- 1029. F-ino W.M. Warman, London, Anglujo.
- 1030. E. J. Bengough, Hamilton, Kanado.
- 1031. S-ino G.R. Bengough, Hamilton, Kanado.
- 1032. J. Haxton, St. Andrews, Skotlando.
- 1033. S-ino Haxton, St. Andrews, Skotlando.
- 1034. C. G. Dixon, Whitehaven, Anglujo.
- 1035. F.E. Knight, Ashford, Anglujo.
- 1036. S-ino W.M. Rixham, Newcastle-on-Tyne, Anglujo.
- 1037. F-ino E. Parkinson, Accrington, Anglujo.
- 1038. R.R. Green, London, Anglujo.
- 1039. G.D. Nash, Slaugham Green, Anglujo.
- 1040. S-ino Nash, Slaugham Green, Anglujo.
- 1041. F-ino C. Sawyer, Birmingham, Anglujo.
- 1042. G.R. Binks, Burnley, Anglujo.
- 1043. W. Kent, Paisley, Skotlando.
- 1044. S-ino L. Kent, Paisley, Skotlando.
- 1045. R. Anderson, Breaston, Anglujo.
- 1046. F-ino G. Bingham, London, Anglujo.
- 1047. K.J. Young, Amersham, Anglujo.
- 1048. F-ino M. Madsen, Holbaek, Danujo.
- 1049. F-ino S.I. North, Birmingham, Anglujo.
- 1050. A. Edmondson, Bingley, Anglujo.
- 1051. S-ino E. Edmondson, Bingley, Anglujo.
- 1052. H. Thilander, Stocksund, Svedujo.
- 1053. S-ino V. Thilander, Stocksund, Svedujo.
- 1054. F-ino I. Halén, Tomtebodaj, Svedujo.
- 1055. S-ino C. P. van Ulden, Haarlem, Ned.
- 1056. G.A. van Ulden, Haarlem, Nederlando.
- 1057. M. Blake, New Barnet, Anglujo.
- 1058. F-ino F. Ågren, Ångby, Svedujo.
- 1059. D-ro A.T. Horton, London, Anglujo.
- 1060. S-ino E.E. Pengilly, Brighton, Anglujo.
- 1061. F-ino O. Morey, Portsmouth, Anglujo.
- 1062. F-ino L. M. Samphire, Portsmouth, Angl.
- 1063. Kapitano C. Nicholson, Moberley, Angl.
- 1064. F.C. Clewlow, Birmingham, Anglujo.
- 1065. F-ino W.E.V. Clark, Wellingborough, A.
- 1066. F-ino C. Arnold, Wellingborough, Angl.
- 1067. F-ino E. Tildesley, Portsmouth, Anglujo.
- 1068. W. Thistlethwaite, Harrogate, Anglujo.
- 1069. J. Tomcik, Bystrice pod Host., Ĉeĥosl.
- 1070. G. H. McCluskey, Whitehaven, Anglujo
- 1071. S-ino E. Davis, London, Anglujo.
- 1072. L. Berg, Sauda, Norvegujo.
- 1073. E.S. Hanks, Melbourne, Aŭstralio.
- 1074. S-ino Hanks, Melbourne, Aŭstralio.
- 1075. F-ino M.G. Astley, Birmingham, Angl.
- 1076. S-ino J. Arnold, Bruxelles, Belgujo.

Laŭlanda Statistiko de la Aliĝintoj:

Anglujo, 667; Aŭstralio, 2; Aŭstrujo, 3; Belgujo, 40; Brazilo, 3; Ĉeĥoslovakujo, 18; Danujo, 7; Egiptujo, 3; Finnlando, 3; Francujo, 83; Germanujo, 4; Hispanujo, 2; Hungarujo, 1; Irlando, 2; Italujo, 9; Jugoslavujo, 1; Kanado, 3; Kimrujo, 8; Nederlando, 50; Norvegujo, 16; Polujo, 12; Rumanujo, 1; Skotlando, 55; Svedujo, 52; Svislando, 4; Usono, 8.

Samideanoj nekatolikaj!

Kiu el vi dum la Budapeŝta Eŭkaristia Kongreso deziras vojaĝi al Budapeŝto, nepre anonci ĝin, ĉar li okupiĝas pri tio, ke la nekatolikoj ne estu malzorgitaj dum la Eŭkaristia Kongreso kaj ili same tiel ĝuu la vidindaĵojn, kiel aliaj. Do skribu al ni vian adreson, titolon kaj nomon, por ke ni povu sendi al vi nian planon pri la promenadoj, amuzadoj, ekskursoj ktp., zorgonte por via bonstato ĉe ni. Ne timu, ni ne volas fari negocon, ni ne volas gajni de vi monon, ni nur volas montri al vi, ke ĉe ni estas bonveninta ĉiu, kiam ajn religio oni havas; la ĉefa kondiĉo estas nur, ke la alvenonto estu honesta homo. Do, ĝis la vido, aŭ revido, ni kore atendas, akceptos kaj servos vin, homar-ama frato nia!

Skribu al: Hungara Esperanto-Federacio, s-ro Jozefo de Mihalik, Sashalom/Budapeŝto, Hungarujo.

dono kun granda sukceso. Entute estas 200 klasanoj. Precipe utilaj al kongresanoj estas la kursoj en la granda magazeno Selfridge, kie 32 personoj lernas Esperanton, kaj en la restoracio Lyons Oxford Corner House, kie 24 el la stabo lernas la lingvon. Estas notinde, ke la kursoj okazas kun la plena subteno de la nomitaj firmoj, kaj dum la ordinaraj deĵor-horoj.

Membraro. — Ĝis la hodiaŭa dato (16-3-1938) aliĝis al la kongreso 1022 el 25 landoj.

Por la Organiza Komitato, Cecil C. GOLDSMITH, Sekretario.

Resumoj en Esperanto

Unu el la plej bonaj propagandrimoj por Esperanto en intelektulaj rondoj konsistas en la iniciato alprenita de jam pluraj nacilingvaj fakperiodaĵoj: aldoni al siaj ĉefaj artikoloj pli malpli ampleksan resumon en la internacia helplingvo. Tiu ĉi diskreta kaj, pro sia reguleco, insista altrudo nesentible sugestas al la legantoj kreskantan komprenemon pri la utileco de Esperanto kaj iom post iom vekas aktivan intereson pri ĝi — ĉefe se multoblighos tiuj mutaj varbadoj en kiel eble plej multaj gazetoj kaj revuoj.

Alia tereno por simila agado troviĝas en la multflanka scienca faklibraro, kiu ĝis nun estis preskaŭ tute neglektita por ĉi tiu celo. Por plenigi tiun mankon ni kreis Bibliografian Servon per Esperanto, celante precipe la franclingvajn regionojn, kiu funkcias proksimume laŭ la jena principo:

Ni petas al scienca verkisto aŭ al lia eldonisto franclingvan resumon pri verko kiun li nuntempe preparas, aŭ kiu aperis antaŭ nelonge;

Tiun resumon ni zorge tradukas en Esperanton kaj, laŭ reciproka interkonsento, aŭ rekte resendas ĝin al la aŭtoro, aŭ akceptas mendon presigi ĝin ĉe unu el niaj presistoj, je la laŭnecesa libroformato. Se la libro jam estis presita, la resumoj estos gluotaj kiel aldonajo en la tutan kvanton de la restantaj, vendotaj ekzempleroj;

Ni invitas la aŭtoron sendi recenzekzemplerojn al la ĉefaj Esperanto-periodaĵoj, kies adresojn ni tiucele konigas al li;

Dank' al la Esperanto-resumo la verko estos konigata per recenz-artikolo al la tutmonda esperantistaro. Interesitaj samideanoj konantaj aŭ ne la originallingvon de la libro facile kaj rapide povos havigi ekzempleron al si, kaj ĝi estos valora pruvo pri la praktika utilebleco de nia lingvo;

Aktivaj samideanoj el ĉiuj landoj, kiel eble spertaj en la scienca fakliteraturo, estas petataj redakti en siaj respektivaj naciaj lingvoj mallongan informon pri la koncerna libro (karakterizita per sia Esperanto-resumo!) kaj sendi ĝin, kun publikig-peto, al la tiurilataj fakrevuoj de sia lando. Per tiu rimedo la verkaĵo estos rapide diskonigata tra la tuta mondo, kaj la ofta mencio de Esperanto agos kiel valora propagandfaktoro por nia movado. (Noto: Estas konsilinde krei reton de konstantaj kunlaborantoj seriozaj, kaj ni petas agemajn samideanojn el ĉiuj mondpartoj sendi siajn adresojn al Servo Bibliografia Scienca per Esperanto, 11 rue Pougny, Metz-Montigny, Francando.)

Ni sendis al la plej gravaj Parizaj el-

Privilegio, fariĝi la lingvo de internacia trafiko, rezervita al Esperanto

...diris nederlanda ŝtata inspektoro de instruado

Ĉiutendencaj Esperanto-societoj devas kunlabori por atingi enkondukon de Esperanto en la lernejojn.

S-ro L. M. van Loon, ŝtata inspektoro por la elementa instruado (Inspecteur Lager Onderwijs), paroladis antaŭ nelonge en kunveno de unu el la lokaj Esperanto-grupoj de Amersfoort tre favore al la enkonduko de Esperanto en la elementaj lernejoj. Dank' al la komplezo de la parolinto, ni povas ĉi-sekve publikigi ekstraktan el lia parolado.

Kiel raportis al ni s-ano Koopmans el Amersfoort, la parolinto konsilis oficiale ankaŭ la ĉefinspektoron. Ĉar krom s-ro van Loon ankaŭ la inspektoro van Gaasbeek publike rekomendis Esperanton, ni do estas sur bona vojo.

La inspektora rekomendo en oficiala raporto estas grava por nia movado. La ĉefinspektoro nome kompilas el ĉiuj inspektoriaj (regionaj) raportoj unu raporton, kiun li sendas al la ministro por instruado; tiu raporto estos publika.

La esperantistoj certe devas honori s-ron v. Loon pro lia kuraĝo, publike instigi la geinstruistojn. Por tiuj fervoraj gesamideanoj, kiuj volas sendi dankon al la inspektoro, ni aldonas lian adreson: S-ro L. W. van Loon, Ŝtata Inspektoro de la Unuagrada Instruado, v. Oldebarneveltlaan 16, Amersfoort, Nederlando.

Sekvu nun la ekstrakto el la parolado de s-ro inspektoro:

Ne ĉiu movadon mi subtenus per mia nomo kiel inspektoro, ĉar laŭ mia opinio ne ĉiu movado promesas perspektivojn por la estonta evoluo de la instruado. Sed tion mi atendas de Esperanto.

La eventualeco, ke tiel nomita «streektal» (regiona dialekto kun propra literaturo) estu enkondukata en la nederlanda elementa lernejo, havas regionan signifon. Kun iom da fantazio oni povus aserti ke la enkonduko de pluraj «streektalen» povus malhelpi influi la unuecan kulturen de la diversaj regionoj. Ne

donejoj kaj konataj francaj sciencfakaj verkistoj detalan cirkuleron pri la organizo de nia Servo, kaj ni estas ricevintaj aron da promesplenaj respondoj kaj jam plurajn mendojn por resumo-tradukoj. La unua libro, kiun ni prezentos laŭ la dirita maniero, estos la grava verko de L. Elbe: La moralkrizo antaŭ la moderna scienco.

Estus dezirinde ke en aliaj landoj, precipe en malgrandaj (komparu: «Ĉu Esperanto servas al malgrandaj popoloj?» en Heroldo n-ro 964!) ekfunkciu similaj bibliografiaj servoj kiuj, interilante, povus reciproke kunlaboradi kaj interkonsiliĝi.

Esperanto helpu al la scienca faklibro, la scienca faklibro helpu al Esperanto — jen estas nia devizo!

Albert Lienhardt.

P.S. La subskribinto petas bv. sendi al li la titolojn, kun nomoj de aŭtoroj kaj adresoj de eldonistoj, de nacilingvaj verkoj kiuj estas ĝis nun publikigitaj kun resumo en Esperanto.

estas stulta ies aserto ke novaj instruistoj, kiuj ne scipovus koncernan dialekton, spertus malfacilaĵojn, aspirante oficon en lernejo, en kiu estus instruata «streektal». Kaj tiel la «streektal» fariĝus kaŭzo de neegala rajto por ŝtatanoj de la sama malgranda lando.

Tute alie estas koncerne Esperanton. En la estonteco kun Esperanto estos ligitaj pli altaj interesoj. La franca lingvo, eble, por longa tempo restos la lingvo de l' diplomatio, same kiel la angla la lingvo de l' internacia komerco; sed nek la unua nek la dua iam havos la ŝancon, fariĝi la lingvo de l' internacia trafiko de la popoloj diverskontinentaj. Tiu ĉi privilegio ŝajnas esti rezervita al Esperanto.

La miriga evoluo de la tekniko dum la lastaj jardekoj pravigas la opinion, ke en la daŭro de la venontaj kvardek jaroj — pro la pli kaj pli granda rapideco de la mondritmo — manifestiĝos forta bezono je mondhelplingvo. Kaj tial la lernejoj devas iom post iom prepari sin, por antaŭveni la estontan bezonon. *La unaj geinstruistoj, kiuj devas zorgi por la evoluo de l' estontaj generacioj, devas ĝustatempe studi Esperanton.*

Por tion atingi, laŭ mia opinio la Esperanto-societoj devas kunlabori por la sama celo: la plifaciligado de la enkonduko de Esperanto. Diferenco en la vivcirconstancoj, diferenco en religio, diferenco en politiko devas ĉe tio resti ekster konsidero.

Kaj kiam post kelkaj jaroj denove ekestos okazo por provi enkondukon de Esperanto en la (nederlandajn) lernejojn, tiam la aŭtoritatoj devos trovi ĉiujn Esperanto-societojn pretaj!

Ĉi tiu vorto estu alvoko, ke la societoj diverstendencaj ĝustatempe interkonsiliĝu por prezenti firman unuecon. Tiam Esperanto povas por la malgranda Nederlando kaŝi en si grandan estontecon de nekonitaj perspektivoj.

La kontraŭuloj asertas

ke ne estas eble enkonduki unu komunan lingvon por ĉiuj popoloj, ĉar la lingvaj organoj de la diversaj popoloj tro malsimilas. Tio simple estas eraro. Malsimilas ne la lingvaj organoj sed la alkutimiĝo. Ido de negro, aŭ de ĉino, aŭ de indiano — konstante edukita en angla, aŭ franca, aŭ germana medio — parolas la lingvon anglan, aŭ francan, aŭ germanan same perfekte kiel aŭtentika anglo, franco, aŭ germano.

PROPAGANDO

Propaganda prelego farita dum la Jubilea Kongreso en Varsovio de E. Malmgren

(Daŭrigo.)

14. LA HOTELA SERVO.

Kial Esperanto estas malofte uzata en hoteloj, vendejoj, bankoj ktp.? Jes, kompreneble pro tio, ke ni ne organizis tiujn fakojn. Ni pretigis reton de delegitoj tra la tuta mondo, sed ni forgesis ligi firme al nia movado tiujn fakulojn, kiuj eble plej bone povus servi la Esperanto-movadon. Ĉu mi malpravas? Tute ne! Imagu, kiun grandan servon povus doni ekz. la hotelistoj, se ili anoncus al la hotelgastoj, ke Esperanto estas parolata en tiu kaj tiu hotelo.

Sed nun estas nia devo plibonigi tion, kion ni antaŭe preterlasis. Ni nun komencu serioze kaj sisteme ataki la hotelojn. Ni nome ne forgesu, ke la esperantista popolo estas vojaĝanta popolo. Pro tio la esperantistoj vere povos signifigi ion, kiam la hoteloj prikonsideras la ekonomian flankon de sia entrepreno.

Kaj jen nia propono, aprobata de la komitato de IEL:

La delegitoj de IEL iru al mezbona hotelo en sia urbo, kaj diru al la hotelgastoj, ke Esperanto estas parolata en tiu kaj tiu hotelo, ekz.:

« Mi estas reprezentanto de IEL, la internacia organizaĵo, al kiu aliĝis Esperanto-federacioj tra la tuta mondo, kaj kiu havas specialajn reprezentantojn en la plej multaj landoj. Tiu Ligo eldonas jarlibron. Ekde nun oni intencas en tiu jarlibro senpage enpresi, sub aparta rubriko, la nomojn kaj adresojn de tiuj hoteloj, kie oni parolas Esperanton. La ligo ankaŭ starigis la principon, ke ĝenerale estu prezentata nur unu hotelo en ĉiu loko. Pro tio mi nun turnas min al vi — nur al vi — kun la demando, ĉu vi estus preta instigi aŭ ordoni al iu aŭ iuj el viaj oficistoj lerni Esperanton. En tiu okazo mi aranĝos tiel, ke via hotelo ricevos senpagan reklamon en nia internacia jarlibro, al kiu jam en oktobro estos aldonata suplemento. Mi ankaŭ asertas, ke ni ne enpresos reklamon por iu alia hotelo en tiu ĉi urbo.

Ĉar inter la Esperanto-parolantoj tre multaj faras eksterlandan vojaĝon, mi antaŭvidas, ke vi profitos de mia proponita aranĝo. Resume: vi (la hotelestro) devigas vin esperantigi oficiston en la hotelo; ni (la esperantistoj) devigas nin fari senpagan reklamon por la hotelo, speciale per anonco en

la jarlibro (resp. jarlibra suplemento). Ĉu vi volas? »

Mi estas tucerta, ke la hotelestro (speciale en pli grandaj urboj) profitos de la aranĝo. Rigardu, mi nur pensas pri la cirkonstancoj en mia hejmurbo Stockholm. En la pasinta somero vizitis Stokholmon proks. 40 ge-esperantistoj. Sed ĉar ne ekzistis interkonsento kun iu speciala hotelo, tiuj esperantistoj loĝis kelkaj en hotelo Patricia, aliaj en Continental, aliaj en Centralhotellet ktp. Tiel la diversaj hotelmastroj ekhavis la opinion, ke dum la tuta somero venis al Stockholm nur 3—5 Esperanto-parolantaj eksterlandanoj. Kaj tial ne indas fari specialajn aranĝojn por ili. Aliflanke imagu, kiun impreson ni estus atingintaj, se ĉiuj esperantistoj estus loĝintaj en la sama hotelo! Estu certa, ke tiu hotelmastro havus la opinion, ke Esperanto estas tre disvastiĝinta inter eksterlandanoj, kaj li farus por la venonta jaro ankoraŭ pli por kontentigi la esperantistojn.

Sed nun mi venas al treege grava punkto. Post kiam ni elektis unu hotelon esti la loka Esperanto-hotelo, ni ĉiuj, ĉiuj esperantistoj, nepre devas apogi ĝuste tiun hotelon. La elektita hotelo devas esti mezbona kaj havu modestajn prezojn. Kaj prezojn, kiuj estas 5 centimojn pli malaltaj, ni ĉiuj tamen proponu kaj elektu la Esperanto-hotelon. Je ĉies nia solidareco dependos la sukceso! Ni estu solidaraĵ!

15. EKSPOZICIOJ.

En kelkaj landoj oni jam provis per Esperanto-ekspozicio montri al la granda publiko, kio estas Esperanto. Ĉar la atingitaj rezultoj estas tre kontentigaj, mi nun kaptas la okazon rekomendi al tiuj lokoj, kiuj preparas kursojn por komencantoj, prezenti al la publiko tian ekspozicion.

La cirkonstancoj ja estas tre diversaj, kaj pro tio estas malfacile doni ĝeneralajn konsilojn. Ĉio ja dependas de la ekspozicia salono aŭ de la ekspozicia fenestro, kie oni lokigas la materialon. Se oni havas nur fenestron aŭ malvastan ĉambron, tiam oni kompreneble devas ĉion resumigi. Tion oni prefere faru tiamaniere, ke oni algluas sur kartonojn la koncernajn broŝurojn, afiŝojn, libretojn ktp. Kaj la kartonojn oni pendigas al la muroj.

Sed se oni disponas pri pli granda ĉambro, kaj se oni havas ampleksan materialon, oni prefere havigu al si lon-

gajn bretojn aŭ tablojn, sur kiuj estu la materialo. Oni devas apartigi la diversajn fakojn de la ekspozicio, por ke estu ordo. Mi ankaŭ atentigas vin, ke, se vi uzas tablojn, kaj havas la materialon sur ili, tiam estas necesaj pli multaj helpantoj por la persona informado (kaj observado!) de la publiko.

Ĉar multaj Esperanto-kluboĵoj estas malfortaj, mi rekomendas al la estraroj de la landaj asocioj pretigi « migrantan ekspozicion » por siaj kluboj. Se oni saĝe kompilas la materialon, oni facile povas lokigi ĝin en ordinara ligna kesto por la transportado inter la diversaj lokoj.

La ekspozicio povas havi la jenajn fakojn:

1. Esperanto en la turismo.
2. Foiroj.
3. Reklamo.
4. Originalliteraturo.
5. Tradukita literaturo.
6. Kantado kaj muziko.
7. Poezio.
8. Religio.
9. Radio.
10. Filatelio.
11. Scienco.
12. Esperanto kaj laboristoj.
13. Blinduloj.
14. Instruistoj.
15. Esperanto-korespondado.
16. Lernolibroj, en- kaj eksterlandaj.
17. Propagandaj kartonoj por aliĝo al la landa asocio.
18. Kolekto de Esperanto-ŝlosiloj.
19. Esperanto-gazetoj, ktp.

Mi ankaŭ atentigas vin pri tio, ke vi provu fari la ekspoziciojn iom amuzaj. Se vi en via rondo havas kapablan desegniston, tiam petu lin desegni ion interesan. Kiel ekzemplon mi prenu la filatelion. Desegnu knabon, kiu kolektas poŝtmarkojn. Li sidas ĉe sia tablo kaj havas antaŭ si preskaŭ malplenan poŝtmark-albumon. La knabo ekvidas en la gazeto anoncon pri Esperanto-kurso. Li interesiĝas, iras al la Esperanto-kurso, metas anoncon pri filatelio en internacian Esperanto-gazeton. La gazeto alvenas al multaj landoj en ĉiuj kontinentoj, kaj oni vidas japanon, ĉinon, indianon kaj negron ktp. legi la gazeton. Kaj je la fino oni vidas du leterportistojn kun plenaj sakoj marŝi al la knabo, kiu nun havas eblecon plenigi sian poŝtmark-albumon. — Jen unu ideon! Mem eltrovu aliajn! Sed antaŭ ĉio: aranĝu tiel, ke la publiko amuziĝas kaj samtempe ekhavas respekton antaŭ Esperanto.

Kaj tiel vi trovos, ke Esperanto-ekspozicio bonege servas kiel propagandilo antaŭ kurs-aranĝo. (Finota.)

PROPAGANDU

ĉiam, ĉie, ĉiel
kiam, kie kaj kiel eble!

Oranje-balonoj trovitaj en Norda Finnlando

Ĉu Esperanto ne estas populara ?

Kiel raportas nederlandaj ĵurnaloj, la 22-an de februaro alvenis en la lernejo de la Fratinoj de S-ta Ursula en la sud-nederlanda urbo Roermond paketo el Finnlando, destinita por la lernantinoj Mia van As, 11-jara, kaj ŝia fratino Greta, 12-jara. Okaze de la nacia festotago en Nederlando, festita la 1-an de februaro pro la naskiĝo de princino Beatrix, nederlandaj infanoj enaerigis 2500 balonetojn, kun surskribo « Leve Oranje! » (Vivu Oranje!) kaj kun alfiksitaj kartetoj. La du nomitaj fratinoj estis kunligintaj siajn balonetojn, kaj la tiam reganta sudokcidenta ventego pelis ilin tra distanco de ĉ. 2200 kilometroj, ĝis Norda Finnlando.

Trovis la balonojn iu Reino Järnfors, filo de arbarkontrolisto, en vilaĝo Kårsämäki proksime de la urbo Oulu (Uleåborg). Kiam li ilin trovis sur ŝlima neĝo « ili estis ankoraŭ tiel grandaj kiel virkapoj ». Li portis la balonojn kun la alfiksitaj kartetoj al la redakcio de « Kaleva », la plej granda ĵurnalo de Norda Finnlando, kiu en sia numero de 13-a de februaro publikigis detalan artikolon pri tiu ĉi afero. De la redakcio de « Kaleva » do devenis ankaŭ la paketo ekspedita al la nomitaj nederlandaj knabinoj.

Sed, vi demandas, kiom ĉi tio rilatas al la populareco de Esperanto? — En « Haagsche Courant » de 24.2. ni legas:

Kune kun granda nombro da fotoj el Norda Finnlando, eltondaĵoj el la artikolo en « Kaleva », akompananta leteron en Esperanto kaj bela karto de Finnlando, sendis la redakcio de Kirjapaino Osakeyhtiö Kaleva la Oranje-kartetojn, kiuj estis fiksitaj al la balonoj, returne al la infanoj kiuj estis enaerigintaj ilin, kaj aldonis belan albumon kun admirindaj fotoj kaj detalan priskribon pri Oulu. Tiu ĉi albumo estas provizita per dekdek subskriboj de la redakcio kaj personaro de « Kaleva ».

Kio estas por ni, esperantistaro, speciale grava en la citita raporto? Ja tio, ke oni mencias Esperanton sen ia speciala emocio, kiel *ion tute memkompreneblan*, kvazaŭ estus la plej ordinara afero en la mondo, ke — kiam nekunata ekspedanto skribas leteron el urbo en la alta nordo de Finnlando al nekunataj infanoj en Nederlando — oni uzas *la internacian helplingvon*. Estas ĝuste tiu memkomprenebleco kiu ĝojige nin frapas. Cetere ĝuste por tio Esperanto estas kreita.

La kontraŭuloj asertas ke la ideo de lingvo internacia ne sukcesis populariĝi. Ŝajnas ke ĝi tamen jam estas populara, eĉ pli, ol ni esperantistoj mem foje kredas.

Frontbatalintoj postulas enkondukon de Esperanto

S-ro F. Kiehl, komitatano de SFPE en Haguenau (Francujo), ĵus atingis per imitinda klopodado en speciale por ni interesa medio belan poresperantan sukceson, pri kiu la lokaj ĵurnaloj ĵene raportis :

«Aktuala postulo de niaj militviktimoj.

La sekcio de Haguenau-Wissembourg de l' « Unio de l' militinvalidoj, frontbatalintoj kaj militviktimoj de Alsaco kaj Loreno » dum sia ĵus okazinta ĝeneralkunveno akceptis jenan por ĉiuj interesan postulproponon prezentotan pro adopto al la tuta pli ol 65.000 membrojn ampleksanta unio dum ĝia venonta kongreso :

1. Konsiderante, ke estas nia sankta devo pledi aŭ lukti por ĉiu ilo, kiu ŝajnas taŭga por akceli la ĝeneralan akordiĝon inter la popoloj kaj tiele la pacon;

2. ĉar tia ĝenerala akordiĝo nur tiam estos realigebla, kiam ne nur kelkaj instruituloj kaj diplomattoj sed ankaŭ la vasta nur popollernaj sciojn posedanta homamaso sen interpretisto scipovos interkompreniĝi kun ĉiu ajn sur la tuta terglobo;

3. ĉar la tiucele necesa ilo jam ekzistas sub ia formo de la — de l' granda filantropo kaj pacamiko D-ro Zamenhof kreita — mondhelp-lingvo Esperanto, kiu estis dum duonjarcento elprovata kaj brile sukcesis ĉiurilate kaj sur ĉiuj kampoj senescepte;

4. ĉar cetere estas pruvita pere de oficiale kontrolitaj provoj, ke ekzemple lerneĵanoj, kiuj post 6-monata Esperanto-lernado ricevis dum unu jaro instruon pri la franca lingvo, tiam estas pli fortaj en tiu ĉi lingvo ol samaĝaj infanoj, kiuj ricevis instruon pri ĝi dum eĉ du jaroj sed ne lerninte Esperanton antaŭe;

ĉar do la deviga Esperanto-instruado tute ne pliŝarĝus la lerneĵajn programojn sed kontraŭe ŝparigus eĉ tempon kaj plifruktigus la instruadon de ĉiu alia lingvo kaj de multaj aliaj fakoj (ekz. de geografio);

ĉar krome elmontriĝis, ke Esperanto eĉ por la malpli inteligentaj kaj malfortaj infanoj estas facile lernebla kaj al tiuj de l' sorto malfavoritaj havigas ĝojon pri lernado kaj memfidon;


5. ĉar aliflanke Esperanto estas oficiale aprobita kiel « klara lingvo por la poŝtaj kaj telegrafaj interkomunikiĝoj » kaj jam nun estas kun bonega sukceso uzata i.a. de la Internacia Laboroficejo, de la grandaj foiroj kaj radiostacioj de la plej diversaj landoj, krome de granda aro da gravaj internaciaj kaj naciaj organizaĵoj, de centmiloj da homoj sur ĉiuj kvin kontinentoj kaj sen diferenco rilate al socia rango, religia, filozofia aŭ politika opinio;

6. ĉar fine postulojn favore al Esperanto jam formulis i.a. la unio de la francaj metiistoj, 197 komercaj ĉambroj, multaj urboj, kantonaj kaj ĝeneralaj konsilistaroj, kaj ĉar la devigan Esperanto-instruadon por ĉiuj lernejoj jam postulis i.a. niaj 80.000 geinstruistoj de l' nacia sindikato; —

nun ankaŭ ni, frontbatalintoj kaj militviktimoj, por precipe akceli la interpopolajn integran akordiĝon kaj pacon kaj la universale homan, kulturalan progreson, insiste postulas baldaŭan enkondukon de la deviga Esperanto-instruado por ĉiu lernejo. — »

(Ĉi tiu teksto tiel bone efikis, ke ĝi tuj konvinkis la prezidanton, s-ron Koch, de tiu pli ol 4.000 membrojn enhavanta sekcio. La prezidanto per ĝi facile konvinkis la komitaton kaj fine la tutan ĉeestantaron de l' ĝeneralkunveno, kiu eĉ unuanime adoptis ĝin kun granda aplaŭdo.)

Grupestroj, delegitoj kaj izolaj gesamcelanoj en la tuta mondo, traduku tiun tekston en vian nacilingvon, adaptu ĝin al viaj lokaj kaj naciaj cirkonstancoj kaj prezentu ĝin al ĉiuj lokaj sekcioj de frontbatalintoj kaj militviktimoj kun la peto ĝin adopti kiel postulon! Jen do bonega okazo por grandefike agi! Esperanto-pioniroj, utiligu ĝin, kaj baldaŭ milionoj da plej valoraj voĉoj plej energie kaj klare aŭdiĝos por la baldaŭa triumfo de nia sankta afero !



Popola Altlernejo Ry, vidata de la ĝardeno.

En tiu ĉi bela domo okazos nunsomere Esperanta ferio-restado (31.7.-10.8.1938) Informojn petu de s-ro Harald Grönborg, Rosenvej 8, Risskov, Danlando.

Lidja Zamenhof en Philadelphia

Jam en somero 1937 oni invitis fraŭlinon Zamenhof al Philadelphia, ĉar ni volis fruan komencon por nia klopodo. Sed ŝia malfrua alveno en Novjorko kaj longdaŭra kurso tie prokrastis ŝian alvenon al Philadelphia. Kiam ŝi finis la Novjorkan kurson, estis jam la kristnaska sezono, kiu malhelpis nian klopodon. Samtempe eksplodis du krizoj en nia urbo: unu politika, la alia pri lernejoj financoj. La unua okupis la ĝeneralan publikon, la dua plenis la menson de l' instruistaro. Ni do laboris kontraŭ neordinaraj malfacilaĵoj. Eĉ la karaktero de la Cseh-kurso estis malhelpo, ĉar ĉeesti tri lecionojn semajne estas neeble por multaj personoj kaj ne-alloge por aliaj. Tamen ni kredis en nia ideo kaj faris nian eblon. 400 leteroj al lernejoj, kluboj, societoj, institutoj, taggazetoj, radiostacioj malmulte efikis. Sed personaj vizitoj efikis: tiam la gazetaj redaktoroj promesis sendi raportistojn por intervjui la fraŭlinon, kaj du el ili efektive faris kaj presigis artikolojn (unu tre bonan kun granda bildo publikigis « Philadelphia Record » de 4.1.1938).

Tiuj intervjuoj havis bonan rezulton; ankaŭ du semajnaj gazetoj (unu pola, kaj unu kvartala reklamgazeto) publikigis artikolojn, sed ili malmulte efikis, same kiel ankaŭ afiŝoj ne multe helpis, nek du paroladoj ĉe supera teknika instituto kaj ĉe Bahaana kunveno. Nur la grandaj tagjurnalaj artikoloj bone helpis kaj altiris aŭdantaron al la publika demonstracio.

La provlecionon ĉeestis ĉ. 200 personoj — ĝi estis inspira travivaĵo. Oni vidas per la provleciono ke la Cseh-metodo vere kompletigas la lingvon Esperanto, ke ĝi estas vere genia evoluo de la instrumentado. Mi diras kiel profesia lingvo-instruisto, ke la Cseh-metodo devus regi en ĉiuj lernejoj kaj ĉiuj kursoj, en kiuj oni instruadas lingvojn.

La unuan regulan lecionon, kiu estis ankoraŭ konsiderata kiel provleciono, ĉeestis ĉ. 40 personoj, inter ili pluraj instruistoj. Ĉiuj estis ĉarmitaj de la metodo. 25 personoj aliĝis al la kurso, kaj pli poste enregistriĝis 5 pliaj. Tiun rezulton en urbo kun dumiliona loĝantaro, granda kulturcentro, komerca kaj havena urbo, oni facile povus taksu malbona. Efektive, ni estas malkontentaj pri ĝi, ni esperis ricevi pli multajn kursanojn. Kaj se ni estus farintaj pli multe da personaj vizitoj ol ni faris, ni sendube estus atingintaj pli bonan rezulton. Ankaŭ cetero ne estus povintaj fari pli multe, ekz. ĉe radiostacioj, kaj precipe ni estus povintaj varbi amikojn kaj parencojn de anoj de la loka Esperanto-societo. Tamen la rezulto ne estas tro malbona, konsiderante la cirkonstancojn: la sezono, la krizo, la plenplena programo de kulturaj kaj distraĵaj okazoj en la urbo, la trileciono aranĝo. Certe ĉirkaŭ tiuj, kiuj nun sekvas la kurson, estas pli granda nombro da personoj kiuj aŭdis pri ĝi, kaj nun komencas fari demandojn, peti informojn ktp. Eble iom post iom ili sin turnos al nia movado, kaj eble el ili venos inspiraj ĉefoj de la movado post kelkaj jaroj. Tion ni esperas, kaj tiel ni devas kontentiĝi.

(Mallongigite laŭ raporto de Joseph W. Dubin.)

ESPERANTO EN FILMO

Filmproduktejo enkondukas Esperanton.

« Maro-Film » en Deventer (Nederlando), kiu sub gvidado de s-ro Alex Roosdorp produktas gravajn scienckulturajn filmojn por agrikulturo kaj brutbredado, aldonis en la lasta filmo « Ora et Labora » al la nederlanda ankaŭ esperantlingvan tekston.

Internacia Konkurso por la Junularo

La trian fojon estas aranĝata de Internacia Kristana Junulara Komisiono, 52, rue des Pâquis, Genève, Svislando. Rajtas partopreni ĝe-junuloj en la tuta mondo, kondiĉe ke ili estu naskitaj: a) por la sekcio de Junioroj inter 1.9.1920-31.8.1924; b) por la sekcio de Senioroj inter 1.9.1916-31.8.1920.

Por ambaŭ kategorioj estas antaŭvidataj la sekvantaj premioj: unua de 500 sv.frankoj, dua de 300 sv.fk., du po 200, du po 100, kaj 5 po 50 sv.fk., krome 40 honoraj medaloj.

En la kadro de la ĝenerala temo: « Kristo kaj la Universala Frateco » la konkursoj devas pritrakti la temon jene: a) Junioroj: « Kian specialan kunhelpon la Kristanoj povus alporti al la verko de la paco? »; b) Senioroj: « La kristanaj fundamentoj de la paco ». La manuskriptoj (ne eldonitaj ĝis nun) devas enhavi 1000-2200 vortojn, se eble maŝinskribitaj (aŭ tre legeble manskribitaj), kun margeno; ili povas esti redaktitaj en kiu ajn lingvo. La nomo de la aŭtoro ne devas aperi sur la verkaĵo, sed nur la naskiĝtago kaj unu gvidvorto. Tiu sama gvidvorto devas esti ripetita sur unu fermita koverto (aldonita al la sendaĵo), en kiu estas enmetitaj la nomo, adreso kaj la naskiĝtago de la konkurso.

Oni sendu la verkaĵojn al la supre citita adreso, nepre antaŭ la 1-a de septembro 1938.

La unua Junularsemajno en Nederlando

La Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo aranĝos kampsemajnon por infanoj de 12 ĝis 18 jaroj, kiuj kontentige kapablas uzi Esperanton. La tendaro estos konstruita sur la — en Nederlando — konata kampterenon Doorn-Aŭsterlits-Maarn, Nederlando. Sporto, ludoj, promenadoj sur la vasta erikejo kaj arbaroj, kantoj ktp. formas la programon. La beleco de la ĉirkaŭaĵoj de nia kampterenon speciale allogos partoprenadon en la sendube interesa kaj ĝuiga kampado. Nederlandaj infanoj pagas gld. 8.— inkluzive la vojaĝkostojn; alilandanoj gld. 3.— sen vojaĝkostoj; do tre malalta sumo.

Anoncu vin baldaŭ al k-dino A.C. Obbes, Boezemlaan 24b, Rotterdam-Noord, Nederlando.

9-a Flandra Kongreso Esperantista

okazos pentekoston (4-6 junio) en la mondfama mezepoka arturbo Brugge (Belgujo). La programo promesas grandan sukceson; ĝi enhavas i.a. la jenajn punktojn: Vizitado de la mezepoka urbo kun ĝiaj belegaj malnovaj preĝejoj kaj aliaj konstruaĵoj; kun ĝiaj mondfamaj muzeoj kun pentraĵoj de Van Eyck kaj Memlinck: kun ĝiaj multaj kanaletoj kiuj donis al ĝi la nomon « Venecio de la Nordo ». Ankaŭ artvespero, sonorilara koncerto, sportfesto (piedpilka kaj aliaj ludoj), balo, sekciaj kunvenoj kaj ekskurso al mezepoka Damme estas sur la programo. La geesperantistoj, kiuj deziras partopreni la Kongreson, estas petataj senprokraste pagi la kotizon, al la poŝtekkonto 4407.30 je nomo de Maria Vincke, kongresakasistino.

Por pli detalaj informoj skribu al la Kongreskomitato laŭ jena adreso: « Sekretariejo de l' Kongreskomitato, Komvest 70, Brugge, Belgujo ». La kotizo estas 3 belgoj (por anoj de Flandra Ligo Esperantista 2.40 belgoj).

Esperanto vivas

BRAZILIO.

Brazilaj partoprenantoj al la Eŭkaristia Kongreso lernas Esperanton.

En Rio de Janeiro estas aranĝita Esperanto-kurso speciale por katolikoj kiuj intencas viziti la 34-an Eŭkaristian Kongreson en Budapeŝto. Ankaŭ en aliaj lokoj kaj landoj multaj katolikoj ekstudis Esperanton, kiu estos unu el la oficialaj lingvoj de la Kongreso. La Budapeŝtaj Esperanto-organizaĵoj faras specialajn aranĝojn por plifaciligi al eksterlandaj vizitantoj la restadon, ĉar nur treege malmultaj fremduloj sciopovas la enlandan hungaran lingvon.

BRITUJO.

Esperanton en la lernejoj!

« The Schoolmaster », of. organo de « National Union of Teachers » (Nacia Unuiĝo de Geinstruistoj), en sia numero de 3.2. enhavis la jenan raporton:

« La urbkonsilantaro de Jarrow (urbo en Durham) lastan semajnon aprobis rezolucion, submetotan al la Asocio de Edukaj Komitatoj, ke la asocio, por helpi al la paco kaj internacia interkompreno, rekomendu al la Registaro enkonduki en popollernejoj lecionojn pri universala lingvo. Oni devus klopodi (daŭrigas la rezolucio) kune kun aliaj nacioj verki lernolibrojn en la universala lingvo, inkluzive speciale de la prezentado de historio pli laŭ socia ol laŭ nacia (naciisma) vidpunkto. »

Pri la sama rezolucio raportis ankaŭ aliaj, ekz. « Peace News », la semajna organo de la « Peace Pledge Union » (pacifista) sub la titolo: « Alvoko por lecionoj pri universala lingvo ».

ĈEĤOSLOVAKIO.

La ĉeĥoslovaka kleriga ministerio permesas Esperantajn lumbildparoladojn en la lernejoj.

La ĉeĥoslovaka kleriga ministerio donis al lektoro H. Seppik el Estonio, kiu nuntempe gvidas bonsukcesajn Cseh-kursojn en ĈSR, skriban permeson fari Esperantajn lumbildparoladojn pri Estonio kaj Svedlando en ĉiuj popolaj, mezaj kaj fakaj lernejoj de la respubliko, kun la kondiĉo, ke la Esp.-Asocio prezentos al la ministerio raporton pri ĉiuj tiaj prelegoj faritaj. La permeso estas subskribita de la ministro mem.

MAROKO.

Neatendite bona intereso en Port-Lyautey.

La salono, disponigita de la Komerca Ĉambro en Port-Lyautey por Esperantokurso, montrigis tro malgranda. Anoncis sin pli ol 50 partoprenantoj. La Komerca Ĉambro cetere disponigis ankaŭ premiojn por la plej bonaj kursanoj.

NEDERLANDO.

Postlernejoj Esperanto-kursoj en Amsterdam nombras 360 gelnantojn.

Oficejo « Esperanto ĉe la Instruado » (sekr.: Van Woustr. 193, II, Amsterdam-Z) komunikas:

En deko da lernejoj en Amsterdam, el kiuj unu aŭ du nepublikaj, unu komunuma mastrumada lernejo kaj cetero elementaj lernejoj publikaj, okazas en la nun kuranta instruaro Esperanto-kurso post la ordinara lerneja horoj. Partoprenas entute 360 gelnantoj. Donadas la kursojn parte profesiaj geinstruistoj, parte nefakuloj. Iniciatis la kursojn plejofte la instruisto aŭ gepatra lerneja komisiono. Por la korespondadreso de ĉi tiuj kursoj interesatoj sin turnu al s-ro K.H. Sportel, sekretario de TAGE, Nieuw Scheemda, Nederlando.

La Esperanto-Literaturo kreskas

Karel Čapek: La Blanka Malsano. Triakta dramo en 14 bildoj. El la ĉeĥa tradukis Th. Kilian. 100 p. 15x21 cm. Prezo broŝ. kr. 15.-, bind. 18.-, plus sendkostoj, ĉe la eldonejo: Moraviaj Esperanto-Pioniroj, Olomouc, Ĉeĥoslovakio. Mendebila ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando, por gld. 1.20 broŝ., aŭ gld. 1.45 bind., inkl. sendkostoj.

Milito aŭ paco — krueleco aŭ humaneco — marŝalo aŭ kuracisto, — kaj la pesto. Ne, ĝi ne estas la pesto, nek la lepro; ĝi estas terurega nova malsano, nekonita ĝis nun, malsano estiĝinta ie en Malproksima Oriento kaj de tie disvastiĝinta tra la mondo: « morbus Chen-gi » ĝin nomas la scienco, la « Blanka Malsano » ĝi nomiĝas ĉe la timigitaj homamasoj. La Blanka Malsano minacas ĉiun homon inter la 40-a kaj 50-a vivojaro. Ĝi estas malsano, dum kiu la malfeliĉa viktimo putras ĉe l' vivanta korpo, ĝis la neniigo. La Blanka Malsano minacas ĉiujn popolojn, la tutan mondon. Milionoj jam pereis pro ĝi. Nenia savo ekzistas. Nur unu simpla kuracisto, D-ro Galén, alinome D-ro « Infanulo », eltrovis la certe savontan medikamenton. Sed li volas ĝin konigi nur sub unu kondiĉo: ke ne plu estu milito! Frenezulo! Oni ne povas subite fermi la fabrikojn por militmaterialo, senlaborigi centmilojn da municiaj laboristoj; oni ne povas simple neniigi tutajn belegajn armeojn — la fieron kaj gloron de la patrujo, armeojn por kiuj estigo oni tiom oferis. Ne, tia kondiĉo ne estas plenumbla.

Kaj plu furiozas la Blanka Malsano, atakas unu post la alia eĉ la plejpotenculojn. Dume D-ro Galén kun preskaŭ 100-procenta sukceso kuracas « siajn malriĉulojn », sed li ne konigas la formulon de sia medikamento. Fine eĉ la Marŝalon atakas la malsano, kaj tio ĝuste en la momento, kiam li komencis venkportontan militon. Akre li luktas kun si mem. En la momento, kiam li decidiĝis revoki sian armeon kaj fari pacon, kaj jam estis telefoninta al D-ro Galén por esti kuracota de li, ĉi tiu volante aliri la palacon de la Marŝalo estas atakata kaj mortigata de la deliranta popolamaso, ĉar li ne volas kun ili kribi ke « vivu la milito! »! Kun D-ro Galén pereis ankaŭ lia sekreto, kaj tiel ankaŭ la perejo de la Marŝalo estas decidita. Kaj « la masakro, kiun li ekfunkciigis, sensente ruliĝas trans lin ».

Profunda tragedio preterruliĝas antaŭ niaj okuloj; sed ĝi estas la tragedio de nia propra epoko. Necesas nur doni al la Blanka Malsano alian nomon, kaj al la agantaj personoj de la tragedio la nomojn de kelkaj agantoj sur la nuntempa mondtribuno. Solvon la libro ne donas. Ĝin devos trovi la homaro mem.

Tiu ĉi libro ne estas facile digestebla. Ĝi devigas nin primediti la nuntempan iradon de l' mondo ĝis la lastaj konsekvencoj. M.

Esperantista kalendaro 1938. Eldonis Esp.-Asocio de Estonio, Tallinn, postkast 6. — 24 p. 9 x 13 cm, broŝ. Prezo ne montrita. — Tre praktika poŝkalendaro kun la adresoj plej gravaj por esperantisto, precipe por estona esperantisto. Indikante pri Heroldo, estus tamen utile menciigi ke ĝi aperas semajne, kaj indikante pri IEL, estus objektivaj menciigi ankaŭ la semajnan Heroldon kiel ĝian oficialan organon.

Praga 1938. Informa broŝuro pri la Internacia Filatela Ekspozicio, okazonta de 26.6. ĝis 4.7.1938 en Praha, Ĉeĥoslovakio. — La bone aranĝita, same bone presita kaj bele ilustrita broŝuro estas verkita en la lingvoj ĉeĥa, germana, franca kaj angla, — la enkonduka artikolo ankaŭ en Esperanto (bedaŭrinde sen supersignoj).

Muusses Esperanto-Biblioteko. Ĉiu serio ampleksas 10 volumetojn de 32-36 paĝoj, formato 13x20 cm. Unuopa volumeto kostas 0,35 gld., tuta serio 2,50 gld. inkl. sendkostoj. — Eldonas J. Muusses, Purmerend (Nederlando). — Havebla ĉe la Libroservo de Heroldo, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando. Recenzojn pri la ĝis nun aperintaj libretoj de la Dua Serio vidu en antaŭaj numeroj.

N-ro 14-15. La Problemo de Lingvo Internacia. Serio de Radio-Prelegoj de D-ro Björn Collinder, profesoro de finno-ugraj lingvoj en la universitato de Upsala. Publikigis Paul Nylén.

En marto 1933 la sveda Radioservo aranĝis grandan diskutadon pri la « mondlingva demando ». Inter la defendantoj de Esperanto tiam konvinke parolis Prof. Collinder. En aŭgusto 1935 kaj ĝis decembro 1936 li faris la 11 prelegojn 10-minutajn de la nun priparolata libreto, resumojn de la pli ampleksaj svedaj (20-minutaj). Ilin prezentas al ni iu el la Esperanta « pra-aĝo », la konata sveda pioniro P. Nylén. Tiuj prelegoj estas kvazaŭ ringoj aŭ cirkloj grade malgrandiĝantaj, ĝis ili atingas la centran punkton: Esperanto. Collinder donas al ni superrigardon pri la eŭropaj lingvoj laŭ ilia graveco, instruas nin pri la ĝeneralaj hindo-eŭropaj lingvo-familioj kaj klerigas nin pri multaj tre interesaj demandoj, ekz.: Ĉu lingvoj « mortas »? Ĉu en la unuaj historiaj tempoj jam ekzistis « mondlingvoj »? Kial foriĝis el ĝenerala uzado la klasika latino? Tute prave asertas la aŭtoro, ke eĉ nuntempaj naciaj lingvoj restas lingvoj senvivaj al tiuj, kiuj ne havas ilin kiel siajn gepatrajn. La ĉapitro « Naturaj kaj artaj elementoj de la lingvo » kontribuas al la fakto, ke Esperanto relative ne estas pli « arta » ol aliaj, parte « arte » ordigitaj naciaj lingvoj. La diferenco nur estas en tio, ke Esperanto estas 100-procente reguligita; sed ĝi ne estas surrogato, kia ekz. la piĝin-angla « help »-lingvo.

Ke la plej multaj homoj eklevas la ŝultrojn aŭ ekrideas, kiam oni komencas paroli pri lingvoj artefaritaj, nin jam ne mirigas, nek ke ili opinias karikaturo la aspekton de Esperanto. Ĉu ekz. al germano la holanda lingvo ne aspektas unuavide karikaturo germana lingvo, kaj inverse? Aŭ ĉu hispano, ne konanta detale aliajn lingvojn latinidajn, ne vidas en ili nur aron da vortoj hispanaj kripligitaj?

Tre interesa estas ankaŭ la prelego « Esperanto en la purgatorio de la kritiko ». Tie Collinder citas la ĉefajn kontraŭargumentojn. Se oni ekz. kritikas la Esperantan « patrino » (anstataŭ, ni diru, pli natura(?) « matro ») oni povus facile reĵeti la sagon, citante el sennombro nur unu vortmonstron tamen eble pli ol 95 % internacia kaj eĉ nacia, nome « aŭtomobilo ». Klasika romano same malmulte ĝin komprenus kiel klasika greko, kvankam ambaŭ lingvoj en ĝi kunigiĝis, kaj logika modernulo, kiu supoze ne konis ĝin sed al kiu oni precize tradukus la nomon (« io, kio per si mem sin movas ») tute ne malpravus aŭ ridindiĝi dirante, ke tio povas esti limako, aŭ lokomotivo. Kontraŭe, jam por la komencanto « patrino » estas senco- kaj sentoplena vorto, kiun li neniel kredas kontraŭnatura.

La volumeto estas valora pliriĉigo de Muusses Esperanto-Biblioteko.

Jofebo.

Esperanta Katolika Broŝuroj-Serio, N-ro 1: Dan. A. Lord, S. J.: **Flirto**. Esperantigita de Frato M. Ludgerus. Sub lingva kontrolo de Frato Wigbertus van Zon, L.K. — 48 p. 9 x 15,5 cm. — Kinheim-Eldonejo, Heiloo, Nederlando. — N-ro 2: **La geedzeco** — la kristana geedzeco de P.J.A. v. d. Cammen, Pr. Esperantigata de F-ino Truus Durenkamp. — 78 p. Sama formato kaj sama eldonejo.

P.G. Wodehouse: La Princo kaj Betty. Tradukis el la angla G. Badash. 185 p. 11,5x18,5 cm. N-ro 3 de « Epoko »-Libroklubo. Prezo por membroj de la klubo ŝil. 1.— plus afranko, por nemembroj la duoblo. « Heroldo de Esperanto », Scheveningen, Nederlando, akceptas aliĝojn kontraŭ gld. 1.95 (inkl. sendkostoj) por tri sinsekvaj volumoj de la « Epoko »-serio.

« La Princo kaj Betty » estas rakonto el la speco de « facile digestebla nutraĵo » literatura. Enhavo opereteca, parte ŝerca, parte serioza sed ne tro, tamen kun kelkaj moral-instruoj. Scenejo: Londono, iu insuleto en la Mediteraneo, iu kastelo en la angla kamparo. La personoj: Mr. Scobell, usona financisto; « La Princo » kiu ne scias ke li estas princo; Betty Silver, duonfilino de la financisto; Lord Arthur Hayling; kaj armeeto da aliaj personoj, eĉ tuta vera « armeo » de la opereta princlando Mervo. Disvolviĝo interesa, parte eĉ streĉa, ĝis la per nenia nubeto malheligata « feliĉa fino ».

La tradukon faris jam sperta pri tio s-ano Badash. Sekve oni trovas malmulte por kritiki. Duloke mi konstatis peketon pri la refleksivo (p. 5, 111). Kelkaj preseraroj, kompreneble. Stranga nomo de germana(?) princo « Swattheir », ŝajne prenita el ia volapŭka artlingvo sed nepre ne el la germana. Sed unu aferon mi ne komprenas: kial angloj ĉiam denove (malgraŭ jam oftaj avertoj) uzas « ĉe », kiam ili evidente intencas diri « en »? Kvankam oni povas stari ĉe hotelo (t.e. sur la strato aŭ sur placo), kaj eĉ povas manĝi ĉe hotelo (ekz. en ĝia ĝardeno), tamen sendube oni luas ĉambron en ĝi. Kiam mi partoprenas la 30-an Univ. Kongreson, mi tre certe volas esti en Anglujo, en Londono, en la kongresejo, kaj ne nur « ĉe ».

M.

XXXIV. Internacia Eŭharistia Kongreso Budapeŝt, 25-29. Majo 1938. Esperantlingva teksto de afiŝo (46x62 cm). Ĝi prezentas sur nigra fono flavan kalikon starantan sur la terglobo. Super la kaliko, blanka hostio dissendas radiojn kiel juveloj; sur la hostio la literoj IHS. La teksto estas en koloroj griza, ruĝa kaj blanka. Entute afiŝo ekesterordinare efika.

Examen doen. — Handleiding ten behoeve van candidaten voor het A- en B-examen. 95 p. 15,5x22,5 cm. Eldonis Libro-Servoj FLE kaj LEEN, Amsterdam, Nederlando.

Gojiga ĉe la jena libro estas precipe la fakto ke ĝi estas eldonita en kunlaboro de la laborista kaj la neŭtrala asocioj, kiuj ankaŭ komune aranĝas la ekzamenojn de la Ĝenerala Nederlanda Esperanto-Ekzamena Komisiono. La libro enhavas taskojn, jam donitajn okaze de pli fruaj ekzamenoj. Do oni povas prave diri ke ĝi estas kreita el la praktiko por la praktiko. Tre rekomendinda al ĉiuj nederlandaj kandidatoj por la A- kaj B-ekzamenoj. M.

Jarlibro 1938, eldonita de SAT, Av. Gambetta 67, Paris 20, Francujo. (17-a jaro.) 30 p. 15x22,5 cm. Ne aĉetebla, ricevas ĝin nur la membroj. Enhavo: statutoj, datoj, listoj, geografiaj tabeloj, adresaro ktp. La venonta SAT-kongreso okazos la 7-13.8.1938 en Bruselo.

Wir schaffen freies Land. (Ni kreas liberan teron). — 36 p. 12x19 cm. Prezo 0.80 sv. fk. ĉe Rudolf Zitzmann Verlagen Lauf, Bern kaj Leipzig.

Germanlingva broŝuro, traktanta la kreadon de « libera » (t.e. libera de ŝuldoŝarĝo) tero en Bohemio, Kanado (Duĥoborzoj), Hindujo (Dalbagh) kaj Svislando (kolonio Schatzacker b. Zürich, ĉefe gvidata de nia samideano Paul Enz kaj de la konata verkisto Werner Zimmermann). Broŝuro interesa kaj tre instrua, montranta ireblan vojon al pli bona estonteco de la homaro. Kun kelkaj ilustraĵoj.

JAVA ARTMETIO

Krom la loĝantaro de nia insulo kaj turistoj vizitintaj la koncernan lokon, ne multe da homoj de nia planedo scias pri la ekzistado de nia specife « djokjaj » (elp. ĝokĝaj) arĝentaĵoj, pri kiuj kelkaj estas klarigitaj per fotobildoj. Temas precipe pri arĝentforĝado aplikata al produktado de luksaj bezonaĵoj, arĝentaj kaj ornamado de testudaĵoj kaj kornaĵoj uzataj en ĉiuj medioj de nia lando.


Ĉi tiu artmetio, deveninta el la 8-a jarcento, konserviĝis tra ĉiuj epokoj ĝis nun en sia sendifekta stato. La relief-motivoj tamen askiĝis en multe pli fruaj tempoj, ĉar ili ankoraŭ estas trovataj sur multaj temploj kaj statuoj de la hinda epoko, kiuj abundas en nia sultanregiono.

nombraj eblecoj en kreado de arĝentaĵoj kaj ornamaĵoj ĝi estas neanstataŭigebla per maŝinlaboro.

Ĉi tiu « knedmartelado » estas en sia perfekteco nur atingebla per multjara laboro kaj ekzercado kaj ne atingebla per kelkjaraj faklernejoj. Ĉi ebligas al la artmetiistoj por la postulitaj ornamaĵoj ĉie sur la arĝento antaŭprepari la ĝustajn dikecojn plej ofte malpli ol unumilimetrajn.

La multekosteco de la uzata materialo estas certe unu el la plej gravaj kaŭzoj kiu instigas la metiistojn perfektigi en siaj sentorganoj por plej ekonomie el-labori la formojn rilate al la solideco de la arĝentaĵoj.

Ornamaĵoj en senfina motivaro, specife



Kelkaj el la belegaj djokjaj artaĵoj.

Pro tio, ke ĉerte interesos niajn legantojn, kiom tia artaĵo proksimume grandas, pezas kaj kostas, jen pri kelkaj ni donas konfomajn klarigojn: a=grando 6,2 x 4,3 cm, pezo 11 gr., kosto 2.50 guldenoj; b=7 x 5,5 cm, 23 gr., 3.50 gld.; e=7,2 x 5 cm, 15 gr., 2.— gld.; f=8,5 x 3,3 cm, 15 gr., 2,75 gld.; i=2,2 x 1,9 cm, 16 gr., 2.25 gld.; k=6,8 x 6 cm, 25 gr., 3.50 gld. — Pliajn informojn oni povas ricevi de la adreso indikitaj en la artikolo.

Estas « Kotta Gede » (pr. Kotagede), vilaĝo pr. 10 km. ekster Djokja, kie la arto plejmulte estas aplikata kiel porviva bezono en gilda kunvivado. En ĉirkaŭ 50 ŝtonaj unuetaĝaj domoj en tiu vilaĝo, en kiuj koridoroj kaj flankgalerioj servas kiel metiejoj, entute pr. 1000 indiĝenaj viroj kaj knaboj laboras sidante kun krucigitaj gamboj sur la planko, kaj en tre primitiva, tamen origina, labormaniero tie kreigas mirinde belaj artaĵoj. La laboro okazas permane, kaj, se temas pri malnovaj projektoj, eĉ tute parkere.

Arĝento estas fandata en stangetojn kaj dikajn platetojn de certaj pezaj kaj bezonata pureco, kutime 900/1000, kaj poste martelata en la formojn de la celitaj objektoj. Ĉiufoje per hejtado moligante la arĝenton malmoligintan pro la frapado, kaj ĝin per diversformaj marteloj kaj amboŝetoj prilaborante, la metiisto povas elvoki ĉiam formon de objekto. Ĉi tiu labormaniero ŝajnas malnoviĝinta, sed kiel artmetio kun siaj sen-

indiĝenaj, estas sur la arĝentaj objektoj, diversmaniere ŝizitaj, frapataj kaj eltranĉataj, kaj poste per brulado nigriĝataj, por ke ili brile distingiĝu al la homaj okuloj.

Ĉi tiu arto, antaŭe nur aplikita sur indiĝenaj korpornamaĵoj, intertempe ege disvastiĝis ĝis la aplikado al multaj por eŭropa uzo destinitaj artikloj: tualetaĵoj, manĝilaro, skatolaro, skribilaro, vazoj, portretkadroj ktp.

Por turistoj ĝenerale estas vera surprizo konatiĝi kun ĉi tiuj « ĝokĝaĵoj », ofte sekvata de vigla aĉetado.

Inter la multaj ĉitiejaj butikoj, vendantaj ĉi tiujn indiĝenajn artaĵojn, estu rekomendataj du bele provizitaj, ili estas la PEKARJAN NGAJOGIJOKARTO, fondaĵo por progresigadi la Djokjan arĝenta-artmetion kaj HET VERZEND-HUIS, Gondolaŭe 32, en kiu lasta posedantino kaj geservistoj per Esperanto laboras, vastigante sian komercon ĉien en Esperantujo.

Dum la bomboj brute breĉojn ŝiras...

La mondo iĝas grade pli freneza:
Ĉe rando de abismoj ĝi promenas.
Solece kuŝas ora vojo meza,
Ekstretoj pli kaj pli potencon prenas.
La mondo kvazaŭ vivas sur vulkano,
Tuj ĝin minacas murda erupcio;
Sed senatente kuras ĝi, sen plano,
Rekte renkonte al la tragedio.

La mondo estas vasta, bela, riĉa:
El korn' abunda ŝutis dia mano
Sur kampojn frukton por rikolt' sufiĉa.
Sopiras greno iĝi nutra pano.
Sed sur kamparo spikojn rodas putro
(Ĉar vendi sub la prezo ne valoras),
Dum al homfratoj urĝe mankas nutro,
Infanoj pepe por panpeco ploras.

La mond' deliras en militpsikizo,
Unu nur pens': ekstermo, ruinigo!
Fabrikoj mil susuras sen ripozo,
Produkti ilojn de la neniigo.
Jam la unuaj signoj sange-ruĝe
Tra l' nokto flagras sian flam-averton:
Kien, Homar', rapidos vi rifuĝe,
Por kaŝ-eviti plej teruran sperton?

Tra nuboj pereigajn cirklojn tiras
De l' Mort' senditoj: birdoj la fantomaj;
Brizancaj bomboj brute breĉojn ŝiras
En urbkvartaloj kaj en korpoj homaj.
En korpojn homajn homa la malico
Inside brulon sendas kaj venenon;
Faladas la kadavroj vic' post vico —
Satano benas tian entreprenon.

Ja homo mem sin faris satanido.
Amon predikis Kristo, toleremon.
Sed regas nur malamo, malkonfido.
Kiu en korojn plantis tian semon?

Haltu, Homar'! Returne de l' abismo!
Homdignon rememoru, homan decon!
Forlasu jam metodojn de l' murdisimo, —
Kaj fine surtronigu la Homecon!

T. J.

Aforismoj pri nia afero

Estas malfacile, resti pacienca ĉe la provoj, partoprenigi siajn kunhomojn en la propra pliklerigo. Ili interesiĝas pri ĉio sen la emo lerni ion. Guste ĉe la Esperanto-propagando oni tion ĉiam denove spertas ĉagrene. La kunhomoj aŭskultas kun intereso, ili postulas pluajn klarigojn, ili ertuziasmiĝas kaj eĉ kelkfoje riproĉas pro tro granda modesteco, sed poste — ili foriras, forgesas kaj venontfoje evitas la saman temon.

Por la lernado necesas la intereso, por la intereso la kredo. La komencanto devas unue lerni kredeme la novan. La dubemo estiĝas de si mem. Ni do unuavice devas montri firman kredon pri nia afero, kaj ĉi tiun kredon ni montras multe pli per serioza senlaca laboro ol per trompa, brua propaganda agado.

Ni malofte utilas per tio, ke ni elparolas verojn, donas instruojn; pli ofte per tio, ke ni instigas, metas problemojn, kiuj incitas kontraŭdiron, kiuj ektuŝas la senton. — Oni povas montri la vojon; sed ĉiu mem devas iri ĝin. Ĉu tio ne valoras ankaŭ por nia Esperanto-propagando?

Indiferente kaj moke la mondo malakceptas la nekonatajn minajojn, kiujn la pensuloj, en amo por ĝi, fosas el la plej profundaj ŝaktoj. Sed ili daŭrigas la laboron, ĝis kiam la ŝakto aŭ enrompiĝas super ili kaj la malkaŝitaj trezoroj, aŭ ĝis kiam ĝi malkaŝas tiujn trezorojn al la tuta mondo.
Watzinger, Villach.

EL BORNEO

Kiel obstine konservativaj la homoj estas — ni, la esperantistoj, tion bone scias.

Kaj kiel malvolonte la primitivuloj forlasas siajn morojn, por alpreni la novajn, kiujn pli progresintaj rasoj al ili proponas! Kaj kiel aparte malfacile estas fidi ilin al la moderna medicina scienco; pro tiu obstineco dekmiloj mortas ĉiujare, kiujn niaj kuracistoj facile povus savi!

Mi pripensas ĵus okazintan interparolon kun unu indiĝeno, kiu tamen elstaras pro sia inteligenteco kaj entreprenemo.

Li estas nomita Endok, li apartenas al la Baĝaŭa gento, oni nomas ilin la maraj ciganoj de Malajujo, sed ŝajnas, ke ili pli kaj pli forlasas siajn boatojn, por fariĝi teranoj.

Malgranda Baĝaŭa komunumo konstruis por si vilaĝeton sur oportuna marborda sablaro proksime de nia urbo. Ĝi havas tie sian nepran kokosujaron, ĉe la piedo de roka deklivo fonteton, kiu liveras bonan trinkeblan akvon, kaj kelke da ĝardenetoj per dornaj branĉetoj baritaj kontraŭ la sovaĝaj bestoj, kie oni kulturas, sed ne tre vigle, legomojn kaj aliajn utilajn kreskaĵojn; sub la kokosujoj vagas gekokoj; de siaj enmaraj fiŝkaptiloj el bambuaj stangetoj kaj mato la komunumo prenas laŭbezzone fiŝojn. Post la vilaĝo troviĝas vojo, kiu kondukas laŭlonge de la marbordo al la urbo, kaj, ĉar la domoj, ĉiuj interkomunikantaj per tabulaj vojoj, staras super la maro sur fostoj altaj ok futojn aŭ pli, la loĝantoj bone situacias pri transportado kaj ne devas multe sin ĝeni pri la purigado de siaj domoj kaj vojoj, ĉar oni simple ĵetas ĉion ne deziratan en la maron, kiu afable ĝin baldaŭ forportos, kaj oni alligas la boatojn al la subdomaj fostoj.

Tiel facile kaj feliĉe vivas ĉiu marborda Baĝaŭa komunumo de nia regiono, sed cetere, eble dank' al mia amiko, la entreprenema Endok, ĉi tiu vilaĝeto tute fariĝis tegmentaĵo-fabrikejo.

La viroj forvelas, por kolekti taŭgajn palmfoliojn sur la bordoj de la multaj riveretoj, kiuj enfluas en nian grandan golfon; la virinoj hejme faras el tiuj folioj tegmentaĵojn laŭ la malaja maniero, per kanaj fadenoj kudre fiksante ilin sur kvinfutajn stangetojn; rezultas bona tegmentaĵo, kiun oni povas facile transporti kaj ligi al tegmento-lignaĵoj.

Endok, pro siaj apartaj kapabloj, fariĝis estro de ĉi tiu industrietaj kvazaŭ ĝia vojaĝa komizo; kun liaj kunlaborantoj oni ne havas iajn rilatojn. Ĉiusemajne li vizitas la urbon, serĉante mendojn, kaj tiu, kiu deziras tegmentaĵojn aŭ fariĝi krudajn konstruaĵojn en la praarbaro, aranĝas pri tio nur kun li, kaj nur al li pagas, sufiĉe certa, ke la dezirita laboro estos kontentige farita.

Endok sin deklaras praktika aferisto laŭ la eŭropanaj principoj, kaj sarkasme parolas pri « primitivuloj malhonestaj, kiuj prenas antaŭpagojn kaj poste ne plenumas siajn promesojn ». Tamen pri antaŭpagoj mi zorgas ne tro provi lian virton, ĉar la malajoj ĝenerale estas ankoraŭ pli prunteprenemaj ol repagemaj.

Hodiaŭ li vizitis min por peti antaŭpagon. Kial? Li volas enterigi kaj dece funebri sian junan filon, kiu mortis dum la ĵuspasinta nokto.

Tiu novaĵo mirigis min, ĉar tiu junulo edziĝis antaŭ nur du semajnoj.

La edziĝfesto estis efektive impona afero, kiun sendube oni dum longe memoros, ĉar invitiĝis multaj gastoj eŭropanaj kaj azianaj, kaj oni malavare provizis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, multspecajn kiel la gastoj, kaj la Baĝaŭoj montris siajn gentajn dancojn malofte viditajn. Ĉeestinto raportis al mi, ke ĝi estis efektive tre bona, eĉ grandioza, celebros, kiu certe estis multekosta.

Sed, edziĝinte unu semajnon, la juna filo de Endok ekmalsaniĝis, kaj post unu plua semajno li mortis. Lia patro tion al mi malĝoje sciigis.

Dirinte al li komptajn vortojn, mi demandis: « Kia malsano trafis la malfeliĉan junulon? »

Endok tre malĝoje respondis: « Iuj, miaj samgentanoj, malbone faris kontraŭ mi. »

Mi komprenis, ke li aludis venenon aŭ sorĉon. Nu, eble tiel estis; tio povus okazi ĉe tiu gento.

Mi demandis: « Ĉu vi ne vin turnis al iu el la eŭropanaj kuracistoj de nia urbo? »

Li respondis: « Ni fidis al niaj propraj rimedoj. »

Mi diris: « Sed vi, Endok, povis dum longa periodo observi niajn kuracistojn, niajn hospitalojn, kiel sukcese ni senpage flegas niajn laboristojn, kaj ke multaj el ili resaniĝas, kiuj sen tiu helpo mortus. Ĉu ankoraŭ vi ne komprenas la superecon de niaj metodoj? »

Li silentis. Mi rimarkis, ke larmoj staras en liaj okuloj, kio iom mirigis min, ĉar ĉi tiuj homoj ĝenerale sajnas tre indiferentaj pri tiaj perdoj, aŭ almenaŭ scias tute kaŝi sian emocion.

Do li efektive amis ĉi tiun filon! Tamen, kvankam li vivis sian tutan vivon apud eŭropanoj, tute nescia pri la vera kialo de la malsano, li prefere provis resanigi sian filon per primitivulaj rimedoj eble tute maltaŭgaj, kaj (mi suspektas) ankaŭ per la sorĉarto! Kun kelke da aldonitaj kondolencoj mi donis al li la petitan antaŭpagon.

* *

Disiĝante, ĉiu el ni malĝoje skuis la kapon, sed ĉiu pro tute malsama motivo!

R. F. Vaughan.

Perpetuum mobile

Letero al investema kapitalisto.

Sciante ke vi ĉiam estas interesata pri investoj en ĉiaj bonaj negocaferoj, mi prenas la okazon proponi al vi tion kio ŝajnas al mi esti mirindaĵo, en kiu vi sendube multe interesiĝos, kaj eble skribos senprokraste informante min pri la akcioj kiujn vi volas aĉeti je la fondiĝo de tiu ĉi entreprenado.

La celo de tiu ĉi kompanio estas funkciigi katbienecon en la okcidenta parto de mia ŝtato kie oni povas aĉeti terpecegojn tre malkare. Komence ni havos ĉirkaŭ milionon (1,000,000) da katoj. Ĉiu kato naskos meze dek du katojn jare. Por la feloj oni ricevos dek cendojn por la blankaj ĝis sepdek-kvin por la tute nigraj.

Tiu faros por ni dek-du milionojn (12,000,000) da feloj jare, kiujn oni povas vendi po tridek cendoj meze, farante enspezon de proksimume dekmil dolaroj tage. Laboristo povas senfeliĝi kvindek katojn tage je \$2.00, kaj pro tio ke oni bezonos cent virojn por funkciigi ia bienon, la profito tage estos ĉirkaŭ naŭmil okcent dolaroj (\$9,800). Por la nutraĵo de la katoj ni donos al ili ratojn, do ni fondos ratbienecon apude. La ratoj multobliĝas kvarfoje pli rapide ol la katoj. Do, se ni komencus per miliono da ratoj (1,000,000), ni havus kvar ratojn tage por ĉiu kato. Senfeliginte la katojn ni donos iliajn kadavrojn al la ratoj, donante al ĉiu rato kvaronon de unu kato. Vi povas facile kompreni ke la afero estas memfunkcia kaj aŭtomata de la komenco ĝis la fino — la katoj manĝos la ratojn, kaj la ratoj manĝos la katojn, kaj ni havos la felojn.

Poste ni hibridigos la katojn kun serpentoj, kaj tiam ili senfeligos sin mem ĉiujare, kaj do ni ne devos pagi laboristojn por la senfeligado.

Rido sanigas

Ĉar la kuracistoj manskribas tiel ne-legeble.

Kuracisto iam skribis al sia amiko kaj paciento S., invitante lin al ĝajga vespera societo, kie oni muzikas, kartludos kaj amuziĝos ankaŭ alimaniere. Sed la amiko ne venis kaj eĉ ne senkulpigis sin.

Kelkajn tagojn poste, la kuracisto renkontis lin sur la strato kaj demandis, ĉu li ne ricevis la karton.

« Certe », respondis la alia, « kaj multan dankon! Mi tuj iris al la apotekisto kaj donis al li la repton; li preparis, kaj mi englutis ĝin. Ĝi estas bonega, ĝi helpis min, kaj nun mi fartas multe pli bone. Ankoraŭ unu fojon mian koran dankon! »

La koncerto.

« Ĉu hieraŭ vi vizitis la koncerton? » demandis Mia. « Kion vi aŭdis? »

« Ho, tute multe! », raportis Lia. « Ge-Dar-dow'oj ekzedziĝos, direktoro Kunzig forkuris kun 50.000 frankoj, la dancistino, la Luypaert, vi scias, ricevis onidire brilantkolieron por 200.000 frankoj de sia amiko, kaj ĉe familio Hahn alvenis dunaskitoj. »

Post ĉaso.

« Hieriaŭ, dum la ĉaso, kuglo flugis rekte super mia kapo. Unu centimeton pli malalta, kaj vi parolus kun kadavro! »

Antikvaĵo.

« Mi esperas », skribis juna viro al sia estonta bopatro, « ke mia ĵus realigita oficigo ĉe la Muzeo por Antikvaĵoj instigos vin, konfidi al mi vian ŝatatan filinon. »

En restoracio.

« Kelnero, al ĉiu diabloj! Plena de haroj estas la supo! »

« Pardonu, sinjoro, pardonu: mi estis certa, ke mi elprenis ĉiujn... »

LA ESPERANTISTA REKLAMO

Naskiĝo. Al gesamideanoj Wainö Mehtonen en Oulu, Finnlando, naskiĝis filo nomita Aarre Antero. — Ni kore gratulas.

Geedziĝo. Sian geedziĝon anoncas samideano Maria Franco kaj Prof. Giorgio Canuto, prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, la 5-an de marto 1938. La geedzoj loĝos en Perugia, Via Eugubina 3, Italujo. — Nian plej koran gratulon kaj bondeziron!

Letervespero. La Esperanto-klubo de Frederikssund okazigos letervesperon la 25-an de aprilo. Ni atendas poŝtkartojn kaj leterojn el la tuta mondo. Respondo garantiata. Instruisto Lind, Faergevej 67, Frederikssund, Danlando.

Letervespero. 1-a Germana Esperantista Grupo, Böhm. Leipa, Ĉeĥoslovakio, aranĝos la 20-an de junio 1938 grandan Letervesperon. Skribu multnombro! Respondo garantiata al ĉiuj.

Korespondanta vespero. Ni aranĝos korespondan vesperon je la 1-a de junio. Nepre respondos al ĉiu, kaj vi ricevos ekzempleron de ilustrita folieto pri nia bela marurbo. Skribu multnombro al: Sinjoro W. Head, 35, Ashcombe Park Road, Weston-super-Mare, Anglujo.

Laborista Esperanta Societo en Zagreb aranĝos 23-an de aprilo letervesperon. Skribu al adreso: Laborista Esperanta Societo, Šubičeva 4/V, Zagreb, Jugoslavio.

2 danaj junuloj intencas trabicikli Germanujon, Svisujon, nordan Italujon, Francujon, Nederlandon. Volonte ni vizitos gesamideanojn survoje en la tempo majo-septembro. Skribu al buter-kaj fromaĝisto Chr. Andersen, Aadelund, Brörup, Danlando.

Por studi terkulturon, unue en okcidenta, poste en orienta parto de Anglujo, mi kun kamarado komence de majo trabiciklos Nederlandon, Belgujon kaj Nordan Francujon survoje al Anglujo, kaj ni ŝatus interrilatiĝi kun tieaj samideanoj. Skribu tuj al Aage Madsen, Vallekilde, Danujo.

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolikismo, senpage povas ricevi ilin de la Internacia Katolika Informejo: Fraterhuis, Vliert, 's-Hertogenbosch, Nederlando. (493)

40 studentinoj de supera lernejo kaj kolegio deziras korespondi. Ni nepre respondos. F-ino Vandermeersch, Ecole de filles, Hazebrouck (N.), Francujo.

50 studentoj kaj geinstruistoj atendas poŝtkartojn, leterojn kaj poŝtmarkojn. Respondo garantias la direktoro: S-ro Frely, Ecole des Garçons, Aire s. le-Lys (P.d.C.), Francujo.

Subskribinto deziras korespondi kun ĉiuj interresitaj fraŭlinoj 17-25-jaraj kaj de ĉiuj landoj. S-ro K. A. Andersson, Box 13, Leksboda, Svedujo.

Pravu al nia finiĝanta kurso la vastecon de nia movado, sendante ĉiajn Esperantaĵojn, ilustritajn poŝtkartojn, leterojn ktp. Certe respondos. S-ro J. Nellissen, Breitnersingel 67 B, Hillegersberg, Nederlando.

Mi deziras korespondi, interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Respondo garantiata. Frans Borré, Statie A 275, Putte (Mechelen), Belgujo.

Filatelistoj ĉiulandaj, mi interŝanĝas ilustritajn poŝtkartojn kun belaj poŝtmarkoj; poŝtmarkojn, kvanto kontraŭ kvanto. Afranku bildfilatel! — Frans Patteet, 26 Schoonhoven, Aarschot, Belgujo.

80 novaj esperantistoj, plejparte geinstruistoj, deziras korespondi kun gejunuloj tutmondaj pri diversaj temoj. Adreso: F. Dudás, Kispeszt, Reudörség, Hungarujo.

Fraŭlino 25-jara, itala, bondevena, diplomita, proponas sin, kiel **hejmokamaradino, aŭ guvernistino**, al estiminda germana aŭ hungara familio. Casadio, Battistine 4, Genova, Italujo.

Poŝtmarkojn interŝanĝi deziras Arseni Pauts, Pärnu, Rdt. Jaam, Estonujo.

Ĉu vi volas ricevi informojn pri la bela provinco Dalekarlio, « la koro de Svedlando »? Alskribu la cent kursanojn de T. Morariu, en aĝo de 15-45 jaroj, pere de jenaj adresoj: 1. Instruistino Edith Bodén, Borlänge, Svedlando; 2. Pentristo Sven Stolz, Häradsbygdén, Svedlando; 3. Meblofabriko Valfrid Sandén, Insjön, Svedlando.

Fraŭlino Dagmar Persson deziras gekorespondantojn por siaj 40 gekursanoj, mezaĝaj. Adreso: Vedensgatan 9, Borås, Svedujo.

Fraŭlino Riet Maes, Halstersweg E 32, Bergen op Zoom, Nederlando, deziras interŝanĝi ilustritajn kartojn bildflanke afrankotajn kaj serioze korespondadi pri interesaj temoj kun gesamideanoj el la tuta mondo. Oni respondu multope!

Tre volonte kaj serioze proponate deziras korespondadi per leteroj pri ĉiaj temoj kaj interŝanĝi ilustritajn kartojn bildflanke afrankotajn kun gesamideanoj el la tuta mondo: Fraŭlino M. Moerbeek, Dorpsstraat B 94, Halsteren, Nederlando.

Mi serĉas seriozajn gekorespondantojn el la tuta mondo por interŝanĝi ilustritajn kartojn bildflanke afrankotajn kaj leterojn pri diversaj temoj. Fraŭlino Dena de Groot, Steenbergsestraat 9, Bergen op Zoom, Nederlando.

Eduard Bahrih, Jugoslavujo, Zemun, Karadjordjeva 11, deziras ricevi insignojn de skoltaj, skiaj kaj remsocietoj, kaj naciaj organizoj. Kompensas per poŝtmarkoj, poŝtkartoj ilustritaj, insignoj aŭ aliaj objektoj laŭ deziro.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo: Hector C. Diaz, IEL-Delegito, Santa Fé, Argentino.

Mi deziras korespondi, kaj interŝanĝi Esperantivajn librojn, gazetojn kaj poŝtmarkojn. Lisikov Valerij, Sredne-Moskovskaja d. 90, Voroneĵ, Sovetio.

Pro tro multaj korespondpetoj ricevitaĵe je mia anonceto tute ne estas eble al mi respondi al ĉiuj. Do mi per tiu ĉi vojo petas pardonon. Mitzi Stadlmann, Bahnhofstr. 13, Ebensee, Aŭstrio.

Serioza interŝanĝo. Kontraŭ 100 jubileaj poŝtmarkoj de via lando mi sendos samkvanton da poŝtmarkoj de Italujo kaj italaj kolonioj. Mi interŝanĝas ankaŭ valoron kontraŭ valoro laŭ Yvert. Ne bagatelaĵoj. Atranku filatele! S-ro Roncaglia, Via S. Nicolo da Tolentino 45, Roma, Italujo.

20-jara junulo deziras korespondi kun gejunuloj el Hindujo, Japanujo, Meksiko, Ĉinujo kaj Ruslando. Anker Hansen, Hóm, Ringsted, Danlando.

s. Dimitar Andreev, librejo « Zamenhof », Asenovgrad, Bulgarujo, serĉas gekorespondantojn por siaj 30 gelernantoj, en la tuta mondo Ankaŭ interŝanĝas fotografajojn, librojn, esperantaĵojn. Respondo certa.

Brita sinjoro deziras korespondi kun gesinjoroj en ĉiuj landoj pri ĉiaj temoj kun la escepto de poŝtmarkoj. S-ro D. Shand Munro, 7 The Parade, Cambridge Road, Kingston-on-Thames, Anglujo.

Filatelistoj! Sendu per rekomendita letero kelkajn aero-poŝtmarkojn; mi sendos tuj egalvaloron de belgaj poŝtmarkoj. Respondo garantiata. S-ro M. de Puydt, Rue Van Schoonbeke, 148, Anvers, Belgujo.

S-ro Ferdinand Rejlek, oficisto de imposta administratejo, deziras korespondi kun seriozaj geesperantistoj tutmondaj pri diversaj temoj (ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn, ekonomiajn demandojn ktp.). Ĉiam respondos. Ferdinand Rejlek, Masarykova tr. 5, Teplice-Šanov, Ĉeĥoslovakio.

Gesamideanoj el Ronse ege deziras korespondi, letere aŭ per ilustrita poŝtkarto, kun gesamideanoj de la tuta mondo. Adreso: « La Paca Stelo », Esperanto-grupo, Concordia, Ronse, Belgujo.

Japano, 26-jara junulo, deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj, pri seriozaj temoj. Adreso: Sekimoto-Itaru, Ichijoji-Toronomoto, Sakyoku, Kioto, Japanujo.

28-jara flegisto deziras korespondi kun eksterlandanoj per leteroj kaj poŝtkartoj ilustritaj. Adreso: Folke Svensson, Restad avd 12, Vänersborg, Svedujo.

Dano, filo de bienposedanto, deziras ekkoni kaj studi vivmanieron kaj labormetodojn en tropika terkulturo. « Progresemulo », Poste restante, Vesterbros Postkontor, København, Danlando.

Amiko de la naturo deziras korespondadi kun saminteresulo pri bredado kaj biologio de birdoj, papilioj kaj insektoj. Skribu al F. Matz, Lileengen - Spro, ĉe Oslo, Norvegujo.

S-ro Jozsef Benkő, Budapest VI, Reitter-Ferenc-utca 41a, Hungarujo, korespondas nur poŝtkarte kun ĉiuj landoj.

Kiel malproksimen atingos tiu ĉi anonco? Respondu, ĉar mi deziras korespondi. Karl Håkansson, Stora Kvarngatan 37, Malmö, Svedlando.

Grupo de Esperantistoj (20 anoj) serĉas seriozajn gekorespondantojn en la tuta mondo, per leteroj kaj poŝtkartoj ilustritaj. Interŝanĝas poŝtmarkojn, gazetojn ktp. Ni certe respondos. Adreso: A. Boon, Julianastraat 18, Lekkerkerk, Nederlando.

Teksej-estrino deziras korespondi kaj interŝanĝi specimenojn kun Jacquard-majstroj, -desegnistoj aŭ -industriistoj. Adreso: S. Blum, Gustav-Adolfi 9, Pärnu, Estonio.

Fotografisto deziras korespondi nur kun samprofesiuloj. Interŝanĝas kun ĉiuj fotografajojn, vidaĵkartojn, Esperantaĵojn kaj ŝlosilojn. Adreso: Fotografisto John Simson, Pärnu, Estonio.

Mikroskopisto, serioza amato, deziras interŝanĝon de mikropreparaĵoj ĉiuspecaj, mikrofotaj, fakrevuoj; korespondas esperante, france, germane, angle. Adreso: Ing. A. Lienhardt, 11 rue Pougin, Metz-Montigny, Franclando. — (Kompensas per Esperantaj libroj kaj revuoj la aperigon de ĉi tiu anonco en nacilingvaj natursciencaj gazetoj kaj rubrikoj, aŭ perdon je neesperantistaj samsportanoj.)

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S Antverpeno — Belgujo.

Por la 14-a de Aprilo!

La prezoj estas indikitaj en nederlandaj guldenoj. Se oni mendas por minimume 1.— guldeno entute, ili entenas la sendkostojn. Se la mendo restas sub 1.— guldeno, oni aldonu en ĉiu okazo 0.05 guldenon por pako kaj afranko.

	broŝ.	bind.		broŝ.	bind.
Baghy. Printempo en la aŭtuno. Novelo	0.75		Osmond. Travivaĵoj de Kiki. Originala legaĵo por la junularo. Volumetoj I kaj II, ĉiu kostas	0.15	
Blicher (Bulthuis). Taglibro de vilaĝpedelo. Rakonto	0.15		Robinson. Se grenerejo. Rakontoj	0.75	1.20
Boatman. Jes, panjo. Komedioto	0.15		Scherer. Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo	2.25	
Boatman. La nekonata konato. Mistera rakonto	1.20	1.80	Scott. Filatela terminaro	0.30	
Bröther. Rübezahl. Porjunulara legaĵo	0.15		Storm (Heitmüller). Du majstro-noveloj: 1. La Blankĉevala Rajdanto; 2. Violo trikolora	0.90	1.50
Bukedo. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj	0.15		Sub la signo de l' Espero. Rakontoj el la esperantista vivo. 62 paĝoj	0.15	
Elola (Berenguer). La amo en la jaro dek mil. Romano. 352 paĝoj	1.50	2.40	Tolstoj A. (Pill). Aelita, aŭ: La Marso formortanta. Romano	1.20	1.80
Forst de Battaglia (Jung). La mistero de l' sango. Aktuala scienca verko. Kun multaj portretoj kaj genealogiaj tabeloj	1.20	1.80	Tolstoj A. (Hohlov). La morto de Danton. Tragedio	0.30	
Grimm. Du fabeloj. Porinfana legaĵo	0.15		Trögel (Schröder). Esperanto kaj kulturo. (Individuo — popolo — homaro)	0.30	
Haefker. Jarmiloj pasas. Universala historio (mondhistorio) originale verkita en Esperanto. La plej bela Esperanto-libro laŭ bibliofila vidpunkto kaj kun valora scienca enhavo, verkita en interesa maniero. Kun ses artaj reproduktajoj kaj dek unu geografiaj skizoj. Du volumoj kun ledaj dorsoj, verde kaj ore surpresitaj; la broŝurita eldono en unu volumego kun fortika ŝirmkovrilo	4.50	6.30	Wiesenfeld. Galerio de Zamenhofoj. Kun 18 portretoj	0.30	
Herceg. Pangea, la sole ebla eliro el la mondkrizo	0.15		Wingen. Kiel aranĝi kursojn kaj grupvesperojn?	0.15	
Heroldo-Taschenwörterbuch (Esperanto-Deutsch, Esperanto-Suchbüchlein, Deutsch-Esperanto).	0.60		Zweig (Wolff). La ĉkuloj de la eterna frato	0.75	
Heroldo-Jugendwörterbuch (Esperanto-Deutsch)	0.15				
Hesse. Sonoj novaj kaj malnovaj. Versaĵoj	0.15				
Hohlov. La tajdo. Lirikaj versaĵoj	0.30				
Ilustrita Biblioteko, serio I: Oriento. La tuta serio (kvin numeroj) kostas en unu bela volumeto bindita 1.50; unuopa numero kostas 0.15. Aparte haveblaj estas n-roj 1/2 kaj 4; n-roj 3 kaj 5 estas (kiel apartaj numeroj) elĉerpitaj. Jen la titoloj de la apartaj volumetoj: N-roj 1/2. v. d. Broek: Devi Angreni kaj Mak Miah. Du rakontoj el Javo. N-ro 3. Kuo (Chun): Ribelemaj virinoj. Moderna ĉina dramo en du aktoj. N-ro 4. Kalidasa: Sakuntala. Rakonto el la antikva Hindujo. N-ro 5. Mil kaj unu noktoj. Tri rakontoj el la mond fama fabelkolekto.					
Ilustrita Biblioteko, serio II: La Maro. Prezoi la samaj kiel ĉe la I-a serio. Jen la titoloj de la apartaj volumetoj (ĉiuj kvin estas haveblaj): N-roj 6/7. Gerstäcker: La ŝipĉarpentisto. N-ro 8. Fock (Jarczewski): Navigado estas necesa, kaj du aliaj rakontoj. N-ro 9. Gudrun. Rakonto laŭ la konata eposo. N-ro 10. Cunningham (Newell kaj Sturmer): La hantataj ŝipoj. — Krome: Clarke Russell (Newell kaj Sturmer): Ŝuldpedelo sur la maro.					
Isac (Morariu). Sonorilo kaj kanono. Rakontetoj.	0.30				
Jung. La Alta Kanto de la Amo. Poemo	0.30				
Jung. Landoj de l' Fantazio. Romano	1.50				
Kilian. La mondon al ni!	0.60				
Kitzler. Internacia gramatiko de Esperanto	1.20				
Kloepffer (Goppel). Vagabondo kaj sinjorino. Romano	1.50	2.40			
La Maro. Rakontoj		1.50			
La Multekolora Libro. 128 p. kun tre varia enhavo	0.75				
La senkorpa mistero	0.15				
Maxwell (Sampson). Anstataŭa edzino. Romano	1.50	2.40			
Meye. La longa vojo. Originala romano	1.20				
Mozaiko. Varia legaĵo	0.15				
Oriento. Orientaj literaturaĵoj		1.50			

Populara Esperanto-Biblioteko

(Bonaj libroj, bele eldonitaj kaj tolbinditaj. Prezo de ĉiu volumo 1.95.)

1. Ivans (Versteeg). **La viro el Francujo.** Kriminalromano.
2. Sienkiewicz (Lidja Zamenhof). **Quo vadis?** Vol. I.
3. La sama. Vol. II. (Ni liveras nur ambaŭ volumojn kune.)
4. Haggard (Degenkamp). **Si.** Romano.
5. Ferber (Fabo). **Fanny.** Romano.
6. Oppenheim (Wadham). **Riĉa kaj sen mono.** Romano.
7. Oppenheim (Romford). **La ora ŝtuparo.** Romano.
8. Haggard (Payson/Butler). **Luno de Izrael.** Romano.
9. Collodi (Marchesi). **Pinokjo.** Historio de marioneto.
10. Wells (Milward). **La dormanto vekiga.** Romano.
11. Sinclair (Bailey). **Petrolo.** Vol. I.
12. La sama. Vol. II. (Ni liveras nur ambaŭ volumojn kune.)
13. Norway (Severn). **La aventuroj de Marteno Drake.** Romano.
14. Chesterton (Bean). **La naiveco de Pastro Brown.** Detektivaj rakontoj.
15. Remarque (Berger). **La vojo returne.** Romano.

Muusses Esperanto-Biblioteko

(Prezo de unuopa n-ro 0.35; kompleta serio de 10 n-roj 2.50)

1. Glück. **La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo.**
2. Lermontov kaj Mamin-Sibirjak (Filatov). **Rusaj noveloj.**
3. Jung. **De Muheddin ĝis Mundilatin.** Mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj.
4. Scherer. **Tra Usono kun ruliganta hejmo.**
5. Glück. **El la klasika periodo de Esperanto.** (Grabowski kaj Kabe.)
6. Zamenhof. **La kongresaj paroladoj.** Unua parto.
7. Zamenhof. **La kongresaj paroladoj.** Dua parto.
8. Petöfi (Spieler). **La avo.**
9. de Bengoa (Berenguer). **La ĵusnaskito.** Nekredebla historio
10. Glück. **La Jubilea Kongreso de Esperanto 1912.**
11. **La Ora Jubilea Kongreso de Esperanto 1937.**
12. Thézard. **Nordnordaj rakontoj.**
13. Ŝirjaev. **En la vagono,** kaj aliaj rakontoj.
- 14/15. Collinder/Nylén. **La problemo de lingvo internacia.**

Petu la detalan Libro katalogon de Heroldo! Mendu ĉi-supre indikitajn librojn ĉe:

HEROLDO DE ESPERANTO, Harstenhoekweg, 223, SCHEVENINGEN, Nederlando
 aŭ ĉe
INTERNACIA ESPERANTO-LIGO, HERONSGATE, RICKMANSWORTH (Herts.) Anglujo

